



Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës

Retpaĝo- Faĝa në internet: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet: albanajesperantistoj@yahoo.com

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

Nr. 126, aŭgusto- gusht 2016

Niaj albanaj proverboj - Proverbat tona shqiptare

A rrohet me zemër të lepurit? - Ĉu oni povas vivi kun la lepora koro?

Ai që ndërton me djersë, mbron me gjak. Konstruanta per ŝvito, defendanta per sango

Ai që përton sot, pendohet mot. Pigranta hodiaŭ, pentanta morgaŭ

Ai që s'ka zemër, s'ka as thembër. Malhavanta koron, malhavanta kalkanon

Asht kollaj me ia pre bishtin ujkut të vramë. Estas facile detranĉi la hvoston de mortigita lupo

As në paradisë mos rri vetëm. Eĉ en la paradizo ne restu sola.

Amanetin nuk e tret as dheri La testamenton eĉ la tero ne povas pereigi

La enhavo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

ILEI anoncas

Pagis la kotizon

Jaro de la lernanto

Promociigo de libro "Kanzono por vi"

Intervjuo en Radio TIRANA

Salutmesaĝo

Niaj amikoj eksterlandaj

Por nova strukturo de UEA

Malfermita letero de rumano

Nerealigita vizito de ĉina profesoro

Niaj leteroj

El Kroatio, Francio, Italio, Svisio, Ĉinio, Sudkoreio, Brazilo, ka

Informaĵoj

La novaĵservo Lingvo/studio

En Vroclavo

En Jagelona universitato

En Kroatio

Novaĵoj de Josenilton

Ondo da vero

Nia propagando

Afiŝo en la albana pri Tago de Esperanto
Esperanto en la progresigo de Afriko
Artikolo pri Esperanto en itala-albana revuo RRĚNJĚT = La Radikoj
Esperanto restoracio

Esperanto en bildoj

Salutesprimoj, vegetaloj, piedpilko ka
Hispana samideano Pedro en orienta Eŭropo
Sudkoreanoj reklamas Esperanton dum vojaĝoj
Nepalanoj

Artikoloj

J. Krishnamurti
Ian Fantom- aktualaĵoj
Sorĉa renkontiĝo
Homa mŝino kaj oleo de homa sento
Fermitaj prizonoj
Pledo por alia UEA strukturo
Ŝanĝiĝas la imago de Turkio

Beletraĵoj

Poezio [Siranuish Slagmulder](#)
Sebuhoro, Madzella MALJUNULINO EN TRAMO
AL ĈIUJ TUTMONDAJ VIRINOJ

Sigmond Julia PPAVETOJ KAJ LAVENDOJ

Ismail Kadare- La filini de Agamemnono
Poezio de Rita Petro
Historio de forlasita bebo

Ni kaj UEA, ILEI kaj AIS

• ILEI anoncas :

2016-07-31

La 49-a Konferenco de ILEI komenciĝis sabate vespere en Nyiregyhaza, oriente de Hungario, per la kutima frandvespero, kiu estis ne nur gustuma, sed ankaŭ muzika pro la vigla koncerto de Attila Schimmer el Vieno. Per gastronomio kaj dancado la celo interkonatiĝo estas brile atingita.

Okaze de la malfermo dimanĉe matene salutis la Konferencanojn la rektoro de la universitato S-ro Onder, unu membro de la urba parlamento S-ro Petnehazi, kiu deklamis la poemon « La Vojo » kaj la vic-prezidanto de la departamenta konsilio S-ro Baracsi. Sekvis saluto de estrarano de UEA Lee Jung Kee, saluto de la Honora Prezidanto de Hungara Esperanto Asocio Dr Nanovszky kaj laŭtlegado de salutmesaĝo de la hungara sekcio de la Fervojistoj (IFEF). Hungara muzikgrupo distris la partoprenantojn dum paŭzo. La salutado estis bunta kaj kortuŝa ; ĝi arigis 29 personojn el 28 landoj ; Rumanio estis reprezentita de S-ro Mihail Trifoi kaj Flory, tute juna esperantistino.



Dum la ILEI KOnferenco en Hungario

Dimanĉe posttagmeze la Komitato komencis sian laboron kun kvorumo. La Komitato akceptis novan sekcion en Tanzanio kaj novan sekcion en Barato. Post tio la nombro de la ILEI-sekcioj atingas 41. La Komitato de ILEI elektis novan Honoran Membron, plie el Hungario : D-ino Ilona Koutny. Marija Belosevic tre lerte organizas la Tagon de la Lernado kadre de UK ; pro tio ŝi nun ricevas du pliajn taskojn : zorgi pri la partopreno de ILEI en la Movada Foiro kaj prizorgado de deĵorplano por mastrumi la ILEI-budon. Konsekvence ŝi ricevas novan titolon : Komisiito pri kontribuo de ILEI en UK.

Nyiregyhaza, HU

Mireille Grosjean

Prez de ILEI

- **Pagis la kotizon por 2015**

Antaŭ du monatoj, pagis la kotizon por 2016 jaro, je valoro 599 L, ankaŭ s-ino Martha Otto. Ankoraŭ ne faris tion pluraj aliaj samideanoj, kio malfaciligas la agadon de nia asocio.

Saimir Beqiraj

- **Jaro de la lernanto**

En Nitra ni malfermos la Jaron de la Lernanto, okaze de la Tago de Lernado, kiun prizorgos ILEI en la kongresa mardo. Ni pretigis enkondukan prezenton por la julio-aŭgusta numero de revuo *Esperanto*, kiu tamen povos aperi nur post UK. Tie estis donitaj tri artikoloj: unu enkonduka de Mirejo Grosjean, prezidanto de ILEI, salutmeĝo de la prezidanto de UEA, Mark Fettes, por la 49a Konferenco de ILEI, okazonta tuj post UK, kiu traktas la Jaron. La tria artikolo temas pli pli konkretaj celoj kaj eblaj pashoj el mia plumo. Ni nun sendas al vi partojn de tiu artikolo, por ke vi konsci, ke tra la lastaj monatoj okazis multa preparlaboro ĉe ILEI kaj UEA. Jen la teksto:

Jaro de la Lernanto - celoj, strategioj, kunlaboro

La Strategia Plano de UEA akceptita en 2013 antaŭvidis tri nomitajn jarojn, kiujn la Asocio festu. En la 101a UK estos inaŭgurita la Jaro kaj venos al fino en la UK en Seulo aŭ la 50a

Konferenco de ILEI.

Celoj de la jaro

Jen kelkaj proponoj por la ŝlosilaj celoj:

- Esplori la demandon, kiel loki pli centre en la eduka procezo. la bezonojn kaj dezirojn de la lernanto.
- Daŭrigi kaj fortigi strategiojn, kiel evoluigi la eblojn de perreta lernado.
- Proponi al retaj kursfinintoj la E-vivon por kuraĝigi al ili vere ekuzi la lingvon kaj eniri la E-komunumon.
- Levi en la movado konscion pri la graveco bonkvalite kaj moderne prezenti la lingvon.
- Konvinki la movadon investi pli adekvate en la trejnado de instruistoj kaj mentoroj por retlernantoj.

Strategioj

UEA kaj ILEI kune laboras por realigi la projekton de la Jaro. Signifa agado pri precipe la faka parto de la programo okazos ĉe ILEI. La ligo nomumis etan komisionon por gvidi la laborojn (alfabete): Mirejo Grosjean (Svislando), Stefan MacGill (reprezentanto de UEA, el Hungario), Elena Nadikova (estranano de ILEI, Rusio), Nepo Nguyen (Vjetnamio) kaj Germain Pirlot (Belgio). Inter la fruaj taskoj de tiu komisiono estos verki kaj konsenti pri baza dokumento kiu formale difinos la celojn kaj agadojn de la jaro. Ideale, temu pri proksimume unu-paĝa dokumento.



Dum la UK 101 en Nitra, Slovakio

Jen listo de pliaj proponataj eroj por la programo de la Jaro:

- Okazigi tutmonde serion da renkontiĝoj, kiuj gamas de unuopaj sesioj ĝis plenaj kolokvoj aŭ seminarioj por esplori la temojn de la Jaro.
- Starigi meĥanismojn por adekvate arigi la rezultojn de tiuj sesioj cele al la kreo de jarfina resuma raporto, kune kun rekomendoj kaj planoj por utila pluiro.
- Konsenti pri la pretigo de retejo por la komunikado pri la Jaro kaj por kolekti rezultojn. Tio povos okazi ĉe ILEI aŭ ĉe UEA (ekzemple en la nova retejo 'Aktivulo.net').
- Aperigi en revuo *Esperanto* kaj *Internacia Pedagogia Revuo* regule artikolojn pri la eventoj intaj kaj ontaj kaj pri la diskutataj temoj.
- Pretigi kaj dissendi regule gazetarajn komunikojn pri la Jaro en Esperanto kaj tiom da naciaj lingvoj, kiom eblaj, kiuj celas neesperantistan publikon.
- Starigo de pliaj gvidiloj pri edukrilataj temoj aldone al la ekzistanta gvidilo donacita de ILEI al UEA kaj la komunumo en 2012.

Kion faru lokaj grupoj, landaj kaj fakaj asocioj?

La eblecoj por grupoj kaj asocioj kaj Esperanto-centroj estas multaj. Elektu el inter:

- Anoncu vin al la komisiono, tiel ke ili kompilu reton da landaj kaj lokaj aktivuloj.
- Prenu ekstercelajn gazetarajn komunikojn de UEA/ILEI, laŭbezone traduku ilin kaj laŭeble aldonu iun lokan informon kaj sendu ilin al ĵurnaloj kaj radio-stacioj.
- Evoluigu rilatojn kun ĵurnalistoj por altigi la verŝajnon de akcepto de komunikoj.

- Okazigu en Esperanto urban aŭ landan eventoj pri la temaro – kun prezentaĵoj, forumoj ks.
- Kunlaboru kun edukaj instancoj okazigi forumojn kaj debatojn pri nuntempaj edukaj tendencoj, en kiuj Eo iel vidigu sin, eĉ se nur malrekte.
- Kontribuu al la internacia arigo de referaĵoj kaj rezultoj el la Jaro.
- Kreo de nacilingvaj materialoj kun valoro al edukistoj kaj lernantoj enlande
- Eblo proponi kaj kunlabori kun Duolingvo (aŭ similaj retejoj) pri la starigo de pliaj kursoj por eklerni Esperanton el aliaj lingvoj (modelo estas la pretigata kurso inter la hispana-kaj Esperanto).

Eventoj ligeblaj kun la Jaro

emas pri eventoj, kie ILEI kaj aŭ UEA povos ludi rektan rolon en la JdL-markado. Evidente, ni invitos al pliaj aranĝoj kaj landoj mem organizi festadon.

Dato	Loko, lando	Evento	Statuso
Julio 26	Nitra UK, SK	JdL malfermota ene de la Tago de Lernado (marde – E-Tago).	Certa
Jul 30 -Aŭg 6	Nyiregyháza, HU	Konferenco de ILEI kun rilata konferenca temo.	Certa
Nov 3 – 6	Quangzhou, CN	5a ILEI Seminario en Orienta Azio (ISOA). MG partoprenos.	Esplorata
Nov 11-12	Timisoara, RO	Universitata kolokvo internacia.	Preskaŭ certa
Novembrofine	Malferma Tago de CO (NL)	Partoprenos MG flanke de ILEI.	Preskaŭ certa
Antau jarfino 2016	Senegalo	Kurso - iniciato de MG kaj ILEI – ŝi konkretigu la progreson.	Esplorata
Decembro	Bunda, TZ	6a Afrika Kongreso de Esperanto. Eble kadre de la ligita AMO-seminario.	Certa
Jarŝanĝe	Germanio?	NR aŭ JES aŭ alia jarŝanĝa aranĝo.	Esplorota
Januaro 6-15	Brisbano, AU	Nacia Kongreso kaj Somerlernejo	Proponita
Feb 2017	Poznano, PL,	En la UAM-studsesio	Konfirmata
Majo 23-28	Les Brenets, Ĉ	AMO-LIMA, kiu havos edukan temon. UEA kaj ILEI kune organizos tion.	Certa
Junio 15-18	Sorriso, BR	52a BKE + 37a BEJK. Eble kadre de AMO-seminario	Proponota
Junio-fine	Usono	NASK. Ofte okazas tie AMO-seminario	Proponota
Julio 22-29	Seulo KR	Festado en la Tago de Lernado. Ĉefe ILEI prizorgos tion. (Julio 25)	Certe
Fiksota	50a Konferenco de ILEI 2017	Baldaŭ konfirmota dato kaj loko.	Jarfermo en UK aŭ ILEI-konferenco.

Pliaj proponoj por tiu internacia listo de eventoj estas bonvenaj. La celo de la du artikoloj en ĉi tiu numero de revuo Esperanto estas malfermi la debaton kaj arigi kiel eble plej vastan kunlaboron kaj partoprenon.

Kore Stefan MacGill Vicprezidanto de UEA

- **Promociigo de la libro 'Kanzono por vi'**



La 13an de junio 2016 s-ro Bedri Alimehmeti intervjuiĝis de TV Ora News Tirana Albanio pri sia libro *Kanzono por vi*, publikigita dulingven, albane kaj esperante

Same junio s-ro Bedri Alimehmeti, kunlabore kun la gimnazio "Sami Frashëri" en Tirana, organizis la promociigon de la libro "*Kanzono por vi*", en du lingvoj, albana kaj esperanta. Partoprenis dekoj da gelernantoj, instruistoj, verkistoj kaj publicistoj. Kelkaj lernantoj recitis poeziaĵojn kaj ekzekutis muzikaĵojn. La aŭtoro signis plurajn librojn donacitaj al la partoprenintoj.





Heroina Deliu

- **Intervjuo en Radio Tirana pri Esperanto**

La 29an de julio 2016 la redaktoro Andi Bica de Radio Tirana intervjuis nian sekretarion dum 45 minutoj pri kelkaj temoj rilate Esperanton: historion de la enlanda movado, rilaton de esperanto al la naciaj lingvoj, kiel George Orwell utiligis Esperanton en sia verko "La Jaro 1984", kiaj tradukoj ekzistas de la albana al esperanto, kaj aliaj.





Engjell Gusho

- **Salutmesaĝo okaze de 60 jariĝo de la agado de s-ro Paiva Netto**

Estimata fratamiko profesoro,
estas ja honoro ankaŭ por mi gratuli Vin okaze de tiu granda jubileo, 60 jariĝo de via agado enkadre de Bona Volo.
Kiom mi estas informita, temas pri eduka, scienca, bonfara, socia agado multflanka, kio por la junularo estas eksterordinare grava! Kiel pensiiginta instruisto de matematiko kaj edukisto mi ege estimas tion. Dio donacu Vin pli da vivjaroj por plukontribui al Junularo kaj socio ĝenerale.
Via, je plej alta konsidero, Bardhyl Selimi
Tirana, Albanio, Str Fortuzi 9/1/3 1016 tel [00355682580758](tel:00355682580758)

(Ekde 1975, la Junulara Movado de Legio de Bona Volo (LBV) ĉiu-jare organizas la **Internacian Forumon de la Ekumena Junulo de la Bona Volo de Dio**. Temas pri malferma spaco por debatoj, kultur-artajn esprimojn, krom solidaraj kaj edukaj aktivecoj. La ĉi-jara sesio, kiu finiĝos la 2-an de Julio 2016 en San-Paŭlo, Brazilo, ankaŭ estos granda festo! Ĉefe pro tio, ke tiun eventon persone gvidos s-ro José de Paiva Netto. **En tiu supre citita dato oni ankaŭ okazigos memorfeston pri lia 60-jariĝo de laboro favore al Bona Volo tra la mondo.**

Ĉiuagaj gejunuloj el la tuta Brazilo kaj eksterlando renkontiĝos por partopreni tiun okazaĵon. La temo de tiu ĉi-jara sesio, kiu koncernas al la tezo de la kreinto kaj gvidanto de tiu movado de Bona Volo, estas la jena: *“La Spirite Revolucia Nova Ordonado de Jesuo — La strukturo de nova*

mondo”.

Konu plie pri tiu okazaĵo ĉe <http://goo.gl/TFKPdP>

Do ni tre ŝatus ricevi vian salutmesaĝon, per retletero aŭ filmeto, direktita al la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo, José de Paiva Netto, pro liaj 60 jaroj da agado en la Institucioj de Bona Volo.)

(Kun anticipaj koraj dankoj, akceptu en via koro, estimata **Prof-ro Bardhyl**, ĉi tiun eldiraĵon de la edukanto Paiva Netto:

Mi ne kredas je maljuneco kiel sinonimo de malvenko. Maljuna estas tiu kiu senkuraĝiĝis, perdis la Idealon. Ni estu ĉiam junaj, en iu ajn aĝo.

Kun plej bondeziroj,

samideane, fratinece,

Maria Aparecida da Silva

www.bonavolo.com

www.paivanetto.com/eo)

• LA ESPERANTO-MOVADO MALTRAFIS LA OKAZON POR LEVI ESPERANTON SUR PLI ALTAN NIVELON

Alivorte: La Esperanto-movado mem kulpas pri sia fiasko en la “ekstera mondo” La aŭtoro esperas, ke ĉi tiu hipotezaro povas helpi pli bone kompreni la ekzistantajn problemojn de Esperanto kaj faciligi la reanalizadon kaj reekzamenadon de la celaro de la internacia Esperanto-movado, [1] por liberigi ĝin de la ideologia balasto, de la propagandisma idioteco kaj de la iluzioj de la pasinta tempo kaj por eventuale provi rekomendon sur nova fundamento (kvankam la tempo por Esperanto probable pasis). Studinte dum pli ol 30 jaroj la Esperanto-movadon kaj ties historion, la aŭtoro venis al la sekvaj konkludoj kaj hipotezoj pri la karaktero kaj problemoj de la Esperanto-movado, kiujn li prezentas okaze de la 125-jarjubileo de Esperanto. (Kadre de la verkado de germanlingva versio, la Esperanto-versio de tiuj hipotezoj estis prilaborataj en somero 2015).

La unuopaj hipotezoj estas:

1. Esperanto ekzistas dank’ al la judeco de L.L. Zamenhof kaj al la tiama cionisma debato pri la “juda demando”.
2. La lingvo Esperanto ne estas tiel facile lernebla kiel asertas la oficiala propagando.
3. Ĉio kio ĝis nun estis produktata kaj farata en Esperanto okazis en la nomo de la propagando. Eĉ la Esperanto-beletristiko estis kreata sub la signo de la propagando kaj eksperimentado por provi, ke Esperanto taŭgas kiel lingvo de la literaturo.
4. Ne la t.n. “interna ideo” de Esperanto sed la paranoja malamo de la esperantistoj kontraŭ la angla lingvo kaj la anglalingvaj landoj (t.e. la Okcidento en pli larĝa senco) kuntenas *hodiaŭ* la Esperanto-movadon. Pro tio potencialaj subtenantoj kaj ‘amikoj’ de Esperanto estas diversspecaj skeptikuloj kaj kontraŭuloj de la angla lingvo en la tuta mondo, kaj pro tio ekzistas varma reciproka simpatio inter la Esperanto-movado kaj landoj kiel Ĉinio, Ruslando, Brazilo, Kubo (Sudameriko entute), Vjetnamio k.s.
5. Dum en la libera Okcidento Esperanto fariĝis viktimo de la politika maldekstrisma kaj (pseŭda aŭ kriptaj) religia sektemo (ekz. SAT, bahaa movado), en la ‘socialismaj’ landoj la ideoj de Zamenhof estis uzurpataj por falsa pacretoriko kaj misuzata por ideologia-politika propagando. Tiel, Esperanto fariĝis viktimo de ideologioj, fremdaj al ĝi, kaj de la Malvarma Milito. Per la kolapso de la kpmunismo kaj la fino de la Malvarma Milito (1989-91) Esperanto aŭtomate perdis en tiuj landoj siajn signifon, sencon kaj esencon kaj sian (politikan) ekzistotaĵon.
6. La Esperanto-movado, miksaĵo inter religia sekto kaj politika partio, kiu montras skizofreniajn, paralelsociajn trajtojn, faris nenion esencan kontribuon al la paco, nek al la homaj kaj minoritataj rajtoj, kaj la (internacia) “lingva problemoj” ne estas solvebla per Esperanto.
7. Neŭtraleco ekzistas nek en la kazo de la lingvo Esperanto (lingvistike), nek en la kazo de la Esperanto-movado (politike). La neŭtraleco de Esperanto estas nenio alia ol aserto, imago (fantazio) kaj invento (fikcio) de la Esperanto-propando. La ‘politika neŭtraleco’ faciligis al la esperantistoj, nerekte a) apogi la komunismon kaj rifuzi la kapitalismon kaj, ligite kun tio, b) prisilenti la gravajn lezojn de la homaj rajtoj en la ‘kanajlaj ŝtatoj, por samtempe akuzi la okcidentajn ŝtatojn, precipe Usonon, pro iuj problemoj, mankoj kaj eraroj sur la kampo de la homaj rajtoj en tiuj landoj.
8. Interlingvistiko servas/is precipe kiel propaganda instrumento (aŭ “-armilo”) por (‘science’) pravigi la laŭdiran superecon de la planlingvoj super la naturaj lingvoj kaj de Esperanto super la

angla lingvo.

9. Esperantistoj kiel tiaj interesiĝas/is nur pri Esperanto. La “ekstera mondo” malinteresiĝas/is pri Esperanto, ĉar la esperantistoj ignoras/is la “eksteran mondon”, t.e. la ignorado de la Esperanto-movado kaj de la “ekstera mondo” estas reciproka. La Eo-movado posedas nenion esencan, gravan, utilan, signifan kaj allogan, kion la “ekstera mondo” povus interesi, serioze konsideri aŭ utiligi.

10. Kiel longe Esperanto ne havos en iu ŝtato de la mondo la statuson de oficiale agnoskita (minoritata) lingvo aŭ alispecan esencan oficialan agnoskon fare de iu grava instanco, tiel longe ĝi ne povos ludi publikan rolon en (iu ajn ŝtato de) Eŭropo, UN ktp., pro la valida lingvopolitiko, kaj restos privata iniciato. Esperanto ankaŭ ne estas la lingvo de la “tutmondiĝo” (“globalizacio”). La enkonduko de Esperanto en la lernejojn ne dependas de la Esperanto-movado, do nek de UEA, nek de aliaj Esperanto-organizaĵoj, nek de unuopaj Esperanto-iniciatoj. La amasoj de lernantoj ankaŭ ne lernos libervole Esperanton, sed ili lernas certan lingvon nur, se ili aŭ estas devigitaj de la ŝtato lerni ĝin aŭ se ili sentas ‘devigan’ motivacion aŭ bezonon lerni certan lingvon, kiu estas bezonata por sia vivo.

11. La interreto povos nur parte anstataŭi Esperanton kaj la Esperanto-movadon kaj ludi precipe kompletigan rolon (ekzemple sur la kampo de la informado). Ke dek- aŭ centimloj da homoj lernas Esperanto kun longdaŭra efiko, estas iluzio. Por povi plu ekzisti ne-virtuale, la Esperanto-movado dependos ankaŭ estonte de fizikaj kontaktoj (precipe de kongresoj). Sen tradiciaj formoj la Esperanto-movado diseriĝus kaj pereus. Pure virtuala Esperanto-movado perdis sian senco, des pli ke Esperanto lingve ludas tro malfortan rolon en la reto, en kiu ekzistas tro malmultaj utiligeblaj interesaĵoj por esperantistoj; krom tio, en sociaj retoj tro malmultaj esperantistoj komunikas kun aliaj, kaj la kontaktoj en la interreto estas grandparte anonimaj, hazardaj, supraĵaj kaj vivas mallonge.

12. Pri la fiaskintaj celoj de la Esperanto-movado en la “ekstera mondo” kaj la mizero (aŭ krizo) de Esperanto kulpas ĉefe la esperantistoj mem, kiuj maltrafis la okazon por levi Esperanton sur pli altan nivelon aŭ ebenon de la aplikado. La aktivecoj de la Esperanto-movado baziĝis ĝis nun ĉefe sur propagando kaj libertempo anstataŭ serioza substanco kaj longdaŭra profesia laboro. El tiu situacio la esperantistoj faris neniujn aŭ nur malĝustajn konkludojn.

13. Esperanto malaperos se ĝi ne sukcesos kvazaŭ reinventi sin sur nova fundamento, kiu ne estos ideologia, propagandisma kaj hobiisma, sed kiu estos praktika kaj profesie aplika. Por Esperanto estus pli bone, se ĝi estus ‘surmerkatigita’ sen esperantistoj kaj interlingvistoj.

Johan Derks

• Ni salutas



Du polaj esperantistoj ege helpintaj nian enlandan movadon, Elzbieta kaj Tomaszcz

- **Nerealigita renkontiĝo kun la ĉina profesoro Xie Nong (Longfei)**

Antaŭ du monatoj ni ricevis la jenan mesaĝon:

2016-06-03 3:44 GMT+02:00 Longfei <13801011097@126.com>:

Estimataj Shaban Hasani kaj samideanoj:

Mi estas esperantisto kaj mia nomo estas Longfei Xie, prezidanto kaj profesoro de universitato en la urbo Beijing de Ĉinio. Mi planas viziti vian landon ,renkontiĝi kun vi kaj viaj esperantistoj venont-monate . Mi povos fari prelegojn, se tio interesas vin kaj eblas . Do mi petas de vi la helpojn kaj Bv. informu min, se vi deziras plian informon pri mi au mia universitato.

*Kun plezuro mi estas atendanta vian responddon baldauan. Koran Dankon !
Sincere via Longfei Xie*

Sekvis la interŝanĝo de kelkaj mesaĝoj kaj finfine la ĉina 55 jara profesoro fiksas la daton de alveno, la 31an de julio kaj reveno la morgaŭon. Ni atendis lin en la aeroporto de Tirana, sed li ne aperis ĉe la elirejo. Certe io estis okazinta al li, pri kio post kelkaj horoj ne ricevis la jenan mesaĝon:

Longfei

Estimata:

Ĝus en la bilet-shanĝejo de fluĝaveno grandega kaj bedaurindega afero estiĝis, ke mi ne estis permesita eniri en flugmashinon al via lando. Ili diris al mi , ke mia unufoja Shengen-vizo de Europa Unio ne validas por eniri en Albanion. Mia flug-tempo estas: hodiaŭ vespere je la 21:40 unue al Turkio kaj sekvant-matene je la 07:45 flugi al via lando, kaj je la 8:25 atingi Tiranon. Mi kaj la amikoj en Sofio klopodegis klarigi ke mia reven-flugo estas rekte de Tirano (1-a de Augusto, posttagmeze je 15:00 (la flugo: SU3000) flugi al Beijing, dume per sama vizo mi eniris en Romanion kaj Bulgarion, tamen ili diris ke mi ne povis eniri en Albanion , kaj ankaw jam ne eblas flugi de Tirano al Beijing. Tio tute ne estas antaŭatendata! La flugbileto malvalidiĝos ankau.

Mi ege ĉagrenas kaj bedauregas ke mi jam ne eblas viziti vian landon kaj renkontiĝi kun vi ĉi-foje.

Morgau frumatene amiko akompanos min iri al fluĝaveno por solvi mian flugon al Beijing.

Mi esperu ke vi povu tuj legi ĉi-tiun informon kaj ne iru al fluĝaveno renkontiĝi kun

mi. Kaj mi tuj sciigos al vi ,kiam mi solvos la problemon.

Amike via: Xie Nong

Ni respondis:

Ho mia amiko, amkaŭ mi dubis atendente vin ĉe la fluĝaveno de Tirana de 825-10 horo envane. Iu policisto kontrolis ĉe la vizoficejo sed ne trovis iun ĉinon tie. Mi revenis hejmen pensante ke la la mondo ankoraŭ ne estas malfermita por ebligi la liberan moviĝon de homoj el diversaj landoj. Temas pri grandega lando kiel Ĉinio! Honteme! Ne zorgu kara, mi tuj sciigos tion al samideanoj kaj aliaj amikoj kiuj estis interesataj renkontiĝi kun vi. Ĝis!

Sekretario de AEA

• ***Malfermita letero al estraro de UEA, al tutmonda esperantistaro***

(La opinio prezentita estas se mem aŭtoro, nia redakcio estas neŭtrala je tio-Bulteno de AEA)

Skribas al vi malnova esperantisto el Rumanio, vicdelegito de UEA en Bukuresti (RO), individua membro de UEA, kiu suferis pro Esperanto dum la komunista reĝimo. Post la tiel nomita revolucio el decembro 1989 en Rumanio, la bukureŝta esperantistaro, en januaro 1990, kunvenis kaj per protokolo decidis fondi: *Asociația Română de Esperanto* (Rumana Esperanto-Asocio),. Kune kun la Statuto de la Asocio aprobita dum la kunveno oni petadis ĉe Juĝejo de la sektoro 1(departamento 1) de la ĉefurbo aprobi kaj registri kiel jura persono **Rumanan Esperanto-Asocion** La Juĝejo de la sektoro 1 aprobis kaj registris Asocion kiel jura persono kun n-ro **48/PJ/1990**. En julio 1990 okazis en Timisoara la unua esperantista rumana kongreso post dua mondmilito. La kongreso decidis ŝanĝi la sidejon de la Asocio el Bukureŝto en Timisoara. Vidu: (I.Bociort-*La rumana fenikso ekflugas kaj Rumana Esperanto-Asocio* en: Esperanto(de UEA), nr.10(1018), oktobro 1990, pag.179-180).

Intertempe okazis aliaj kongresoj kaj **en la jaro 1995 Rumana Esperanto-Asocio estis akceptita kiel membro de UEA dum la UK-1995 en urbo Tampere (Finnlando)**. Verŝajne la dokumentoj de la Rumana Esperanto-Asocio troviĝas ĉe CO de UEA. Okazis aliaj kongresoj, oni ŝanĝis la estraron de la Asocio sed nur Aurora Bute restis en estraro. Pri la agado de Rumana Esperanto-Asocio en urbo Timisoara, kie ĝi havas la sidejon vidu: (Vasile Albu-*Septembra semajno en Sibiu*, en: Esperanto(de UEA), n-ro 3(1068), marto 1995, pag.45; *Metodika seminario* en Heroldo de Esperanto n-ro 4-5(1839-1840), 28 marto 1991, pag.2; *Rumanio*, en: TEJO-Tutmonde n-ro 6/1991, pag.12-14; *Historia evento en Rumanio*, en: Internacia Fervojisto n-ro 1/1991, p.11; Angela Stoica-*Reviviĝo en Rumanio*, en: Internacia Pedagogia Revuo n-ro 1/1992, pag.32; Popa Florica-*Rumanio*, en: Internacia Pedagogia Revuo n-ro 1/1997; *Rumanio-Televido*, en: Esperanto(de UEA), n-ro 3(1090), marto 1997, pag.50;).

Pri la agado de Rumana Esperanto-Asocio oni skribis ne nur en la rumana gazetararo sed ankaŭ esperantistaj gazetoj el Rumanio: *Esperanto-Infomilo* de Rumana Esperanto-Asocio, Timisoara; *Medicina Infomilo*, Bukureŝto kaj *Bazaro*, Kluĵo.Do, Rumana Esperanto-Asocio ekde julio 1990 havas sidejon en urbo Timisoara laŭ decido de nacia Esperanto-Kongreso el julio 1990. Ĉiame ĝin estris (gvidis) nur esperantistoj el Timisoara. Do, ĝi ne plu estis en Bukureŝto kaj bukureŝtaj esperantistoj restis sen ejo.

Eble Centra Oficejo de UEA scias kio okazas kun Rumana Esperanto-Asocio, aliĝinta membro de UEA en 1995 okaze de la UK en Tampere (Finnlando), ĉar la lasta konata prezidanto de Rumana Esperanto-Asocio estis Aurora Bute. Mi ne scias kio okazis sed en Jarlibro de UEA 1998 aperis alia asocio kiel membro de UEA. Ĝi estas nomita: *Asociația de Esperanto din Romania* (**Esperanto-Asocio de Rumanio**) registrita ĉe Tribunalo Timisoara kiel nova asocio, kiel jura persono kun n-ro: **72/P/03.02.1998** enhavante novan statuton kiu similas kun la statuto de Rumana Esperanto - Asocio. Konforme kun rumana fiskleĝaro oni registris ĉe fisko havante numeron: **CUI 1162 49 13 el 02 aprilo 1999** (vidu: www.firme.info/asociația-de-esperanto-din-romania-cui11624913/) kun sidejo en Timisoara, strato Orsova nr.1, scara A, ap.9, judetul Timis, kvankam en Jarlibro havas alian sidejon.

Do ni havas du Esperanto-Asociojn kiuj reprezentas Rumanion ?! Ĉu oni ŝanĝis la statutojn kaj regularojn de UEA kaj Rumanio havas kiel membrojn du Esperanto-Asociojn ?! Unua akceptita en la jaro 1995 kaj alia, kiu laŭ nia opinio, ne estis akceptita de UEA sed tamen ĝi aperis en ĉiuj Jarlibroj de UEA post la jaro 1998?

Mi havas kelkajn demandojn al estraro de UEA, kompreneble al Centra Oficejo de UEA de kie mi, ankaŭ aliaj geesperantistoj, atendas la respondojn kaj klarigojn.

1.Ĉu Rumana Esperanto-Asocio estas ankoraŭ membro de UEA?

A).Se jes, tiam kial aperas kiel membron alia jura persono: Esperanto-Asocio de Rumanio?.

B). Se ne, kiuj estas kialoj:

Ĉu ĝi estis elpelita? Kial?;

Ĉu ĝi estis malfondita? Kiam? Ĉar okaze de tiel nomita kongreso de Esperanto-Asocio de Rumanio, Timisoara, septembro 2015, kie partoprenis ankaŭ s-ro Stefan MacGill, per kongresa rezolucio oni rekonis ke ekzistas du naciaj rumanaĵoj por Esperanto: **Rumana Esperanto-Asocio**kaj *Esperanto-Asocio de Rumanio*.

2. Kiam Esperanto-Asocio de Rumanio, alia jura persono, estis ricevita kiel aliĝinta membro de UEA?, ĉar ĝi aperas en Jarlibro de UEA kiel membro de UEA.

Mi sendis detalan leteron kun dokumentoj al ĉiuj membroj de la estraro de UEA ekde majo 2016 kaj mi ne ricevis respondon ĝis nun.

P.S. Por miaj asertoj mi havas kopiojn laŭ dokumentoj, leteroj de I.Bociort al UEA, leteroj de aliaj estraranoj de la Rumana Esperanto-Asocio al UEA. Oni asertis ke Rumana Esperanto-Asocio ne ekzistis. Mi havas atestojn ke ĝi havis agadon ĝis la jaro 1998 kiam Aurora Bute, tiama prezidanto de asocio, ĝi estiĝis propra (privata) asocio registrita ĉe Tribunalo Timisoara, kaj forlasis Rumanan Esperanto-Asocion. Kiu deziras detalajn informojn aŭ kopiojn laŭ dokumentoj, plezure mi sendos al vi. Mia adreso: marian_vochin@yahoo.ie.

Samideane, via Marian(Marin) Vochin, Bukureŝto (RO).

La 1-a de aŭgusto 2016.

El la leteroj

- **Nikola RASIC** <nikolarasic@zonnet.nl>

Urimët të mija për përkthimin e librit Kjo kënge për ju!

Shumë bukur dhe gjithashtu poezi fortë e mirë.

Me miqësi,

Nikolla

(Miaj gratuloj pro la traduko de la libro Kanzono por vi. Bona traduko kaj forta poezio. S-ro Nikola scipovas la albanan)

Mi fakte lernis la albanan mem jam kiel gimnaziano el libroj senditaj de amiko el Gjakovo.

Tiuj libroj estis por serbaj kaj montenegraj infanoj en Kosovo. Unue mi lernis iom paroli dum laborbrigado,

kie mi renkontis tiun amikon,. Mithat Nallbani, kun lkiu mi lastatempe restarigis kontakton post multaj ajrfoj.

Mithat poste venis studi elektroteknikon en Zagrebo, kie mi hazarde renkontis lin! De tiam ni estis nedisigeblaj amikoj

kaj mi funkciis kiel adopta membro de la albana studenta komunumo en Zagrebo.

Eĉ mi membris en la estraro de la studenta Asocio Shkendija, kiu fine havis tre malbonan sorton.

Poste kiel studento de la dua jaro mi vizitis Peja kaj alian jaron Prishtina por someraj kursoj por eksterlandanoj,

kiuj ege helpis sed la lingvon mi jam regis antaue, eĉ tradukis el ĝi por la zagrebaj revuoj kaj abunde recenzis albanlingvajn librojn. Ekz. verkis nekrologon por Eqrem Cabej k.s.

Mi planis iam serioze studi la fenomenon de Arbanasoj en Zara, se tiam la vivo prenis min en alian direkton

en kiu ne plu restis loko por albanologio.

Sed mi estis proksima amiko kun Aleksandar Stipcevic, la iliristo/arkeolohgo, kiu

estis la plej elstara aŭtoro kaj studanto de tiu aparta albana diaspora grupo (la lingvo ankoraŭ parolatas!).

Pasintmonate ni estis gastoj ĉe amiko zagrebano en Florenco, kaj li havas edzinon el Berato en Albanio.

Estis por mi brila okazo dum kelkaj tagoj paroli nur albane kaj tiel iom refreshigis la posedon.

Paintjare en majo ni vizitis Montenegron kaj iris al Shkoder por lunĉa vizito. Unuan fojon en Albanio!

- **Edmond Ludwig** salutas nin el Nitra, Slovakio kie okazis UK 101



Kara Barabhu!

Ĝa penso el Nitra, die ni ĝuas ambaŭ la kutiman estaron de UK!

Belega nacia respere hieraŭ respere sur la ĉefplaco de Nitra kun loba publika. Bonega reklamo eksteren!

Ĝarta bone! Edmond Henriette



- Ho! Multan dankon pro donaco al ni de tiuj 2 gravaj esperantigitaj verkoj. Nian apartan koran gratulon al Vi pro la traduko de tiu romano de Fatos Kongoli. Certe tio estas unu pli tre valora kontribuo al la *Nacia Biblioteko de Esperantujo*.

B.v. akceptu en via koro kiel danko nia tiun eldiraĵon de la verkisto Paiva Netto:

"Kio skulptas nian Animon, tio estas niaj agoj. Ni estas tio, kion ni pensas, parolas kaj faras".

Plej amike, fratinece, Maria Aparecida

www.bonavolo.com

www.paivanetto.com/eo

- **Estimata**

Ho! multan dankon pro la tuja respondo kaj sendo de via informdona, plaĉiga Bulteno. Mi ankaŭ kore dankas, nome de la Esperanto-fako de LBV, pro aperigo en tiu junia numero de 2 leteroj de Legio de Bona Volo al Vi.

B.v. permesu akcepti en via koro, kiel nia danko, ĉi tiun eldiraĵon de la edukanto Paiva Netto: *“**Nenio detenas Homon de Dio, nenio, kiam li strebas al praktikado de Bono**”*.

Multsalute, samideane, Maria Aparecida www.bonavolo.com www.paivanetto.com/eo

- **Tesperanto** . <tamirinha1992@gmail.com>)

Kiel ĉiam, bunta kaj riĉa enhavo! Mi sendas ĝin antaŭen.

- **gazetaro (SK)** <gazetaro@linguistic-rigts.org>

Karaj samideanoj en Albanio

(mi ne membras en la listo, bv. plusendi, au Renato, membrigu min),

dankon por via traduko de la afishteksto kaj dankon al Peter Oliver por la afishpretigo albanlingva!

Jen ĝi en la retejo:

<http://www.linguistic-rigts.org/esperanto-tago/esperanto-tago-2016.html#ET2016SQ>

Kaj tiu ĉi estas la ligo al la klariga teksto en la albana (kiu estas ankaŭ sub la afiŝo):

<http://www.linguistic-rigts.org/esperanto-tago/26_korrik_Dita_e_Esperantos_dita_e_drejtjesise_gjuhesore_albana_sq_Shqip.html>

jen ties mallonga versio:

<http://goo.gl/Sr5O0E>

(en tiu adreso, post la 'S' kaj 'r' kaj cifero 'kvin', sekvas la majuskla 'o'-litero kaj la cifero 'nulo', antaŭ la majuskla 'E'.

Estas bone dissendi/disdoni ĉe informbudo la tekston kun la afiŝo (kaj inverse same), por ke la vidantoj-legantoj povu ankaŭ kompreni la kialojn, detalojn pri la afero.

Sukcesan agadon antaŭ kaj okaze de la Esperanto-Tago 2016!

Stefano

- **Elda Doerfler** <testudo.ts@gmail.com>

KOREGAN DANKON PRO LA SENDO DE LA RIĈEGA ALBANA BULTENO.

pLEJ AMIKE VIN SALUTAS

eLDA

Triesta Esperanto-Asocio

- Amiko,

Jes, ja!!! Dankon pro la rememoro kaj pro afabla sendo de unu el liaj libroj tradukita al E-O. Gratulon al Vi pro tiu versio! Mi certe tralegos ĝin.

La fama verkisto **Ismail Kadare** ankaŭ estas bone konata en Brazilo. Lia verko ***"Prilli i thyer"*** inspiris la brazilan filmon (je 2001) *Abril Despedaçado* (en Albanio: **Mbrapa diellit**) — mi esperas ke la nomoj, laŭ mia konsulto, en la albana lingvo estas korektaj...

Kun miaj fratinaĵoj, amikaj salutoj,

Maria Aparecida

-

Esperanto karavano el Sudkoreio

(10 sudkoreaj esperantistoj baldaŭ vizitos nian landon)

Nia itinero en via regiono estas jena:

12 Aŭgusto (11:ĵaŭ.) turismi en Kotor
Ⓜ *Hostel Old Town Kotor (Montenegro)*

13 Aŭgusto (12:ven.) ekiri de Kotor al Tirana
08:30 ekiri de Kotor
14:30 alveni al Tirana
Ⓜ *tranokti en Hotel Nobel Tirana (Albanio)*

14 Aŭgusto (13:sab.) turismi en Tirana
Ⓜ *Hotel Nobel Tirana (Albanio)*

15 Aŭgusto (14:dim.) ekiri de Tirana al Prishtinë 5~6h
Ⓜ *tranokti en Hotel Nartel (Kosovo)*

16 Aŭgusto (15:lun.) ekiri de Prishtinë al Skopje
17:00/18:00 ekiri de Prishtinë
19:30/20:00 alveni al Skopje
Ⓜ *tranokti en Fis Centar Apartment (Makedonio)*

en la 12a de aŭgusto ni alvenos al via urbo, kaj tranoktas 2 tagojn.
ĉar ni estas grupo, ni jam mendis hotelon(Hotel Nobel Tirana) en la centro, kie alvenas kaj foriras la aŭtobusoj.

mi vidas, ke via loĝejo Rruga Fortuzi estas tre proksima de nia hotelo.

sed la problemo estas tio, ke vi jam forestos post la 6a de julio dum ni alvenas la 12an de aŭgusto.

mi tamen kredas, ke vi kaj prezidanto preparos eblajn aferojn por ni.

jen kelkaj konkreaĵoj demandoj:

1. dankon pro via propono ĉiĉeroni.
2. ĉu vi povas aranĝi malgrandan kunsideton por esperantumi eĉ de nur kelkaj.
3. ĉu vi povas ekzameni la autobuson al Kosovo.
mi petas detalojn sciigi al mi, kaj efektive helpi aĉeton de la biletoj.
4. ĉu vi havas ian kontakton kun esperantistoj en Kosovo?
ĝis nun mi havas nenian kontakton. sed kiam mi vizitis Sarajevo en la jaro 1990,
mi certe kontaktis telefoen iun profesoro(tiam mi estis la estrarano de UEA).
5. mi sendis detalan leteron, itineron kaj pri mi. ĉu vi ne povas vidi pdf-dosieron?

kun koraj salutoj

So Gilsu el Koreio.

Informaĵoj

- Skipo de sciencistoj de iu universitato en Belgujo anoncis la inventon de iu maŝino, kiu konvertas urinon en trinkeblan akvon kaj ankaŭ en sterkaĵon, per la helpo de sunenergio, kio estas tekniko uzebla en kamparaj regionoj kaj en evolulandoj.

La sistemo, kreita de la Universitato de Gento (en Flandrio, norda parto de Belgujo), utiligas specialan


membranon, kaj la sciencistoj asertas, ke ĝi estas efika pri la konsumado de energio kaj povas esti aplikata en areoj sen elektra energio.

“Ni sukcesis elrekuperi sterkaĵon kaj trinkakvon, uzante nur simplan procedon je sunenergio”, asertis la esploristo Sebastiaan Derese, el la menciita universitato.

La urino estas kolektita en granda likvujo, varmigita per suna energio kaj pasigita tra iu membrano, en kiu la akvo estas elrekuperita kaj kie mineralaj saloj, kiel kalio, nitrogeno kaj fosforo, estas apartigitaj.

Kun la anglalingva kradvorto #peeforscience (#urinoporlascienco), la skipo utiligis la aranĝaĵon dum dektaga muzikfestivalo en Gento (la ĉefurbo de la belga provinco Orienta Flandrio), tiam elrekuperante 1.000 litrojn da akvo el la urino de la publiko.

La celo estas instali pli grandajn versiojn de la maŝino en gimnazioj kaj fluĝavenoj, sed ankaŭ porti la inventaĵon al kamparaj regionoj de evolulandoj, kie sterkaĵoj kaj trinkebla akvo estas maloftaj, kiel diris Derese.



- Unu psikiatro, unu esploristo, unu entreprenista inĝeniero kaj unu multidisciplina skipo unuiĝis por realigi sonĝon, nome : ĉirkaŭiri la mondon per aviadilo movata per suna energio.



Tiu historia kuraĝa atingo okazis tiam, kiam la aviadilo Solar Impulse II surteriĝis sur la internacia fluĝaveno de Abudabio (la ĉefurbo de la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj), je la 4-a horo kaj 5 minutoj de la lasta mardo (la 26-a), sur la sama loko, de kie ĝi deteriĝis en marto 2015, por la aventuro, kiu transpasis la limojn de la renovigebla energio en la mondo.

Alternante la pilotadon de la aerveturilo, Bertrand Piccard (la psikiatro) kaj André Borsçberg (la inĝeniero) traveturis totalan distancon je 43.041 kilometroj, sen fuelo, kio estas tute nova en la energia sektoro. En ciferoj, la ĉirkaŭrado de *Solar Impulse* konsistis entute el 17 flugoj kaj 558 horoj kaj 6 minutoj da flugotempo ĉirkaŭ la mondo.

La 17 mil fotovoltaaj ĉeloj en ĝiaj flugiloj kaptas energion de la suno kaj generas elektron, kiu povas esti konservata en ĝiaj baterioj dum la tago, ebligante, ke la aviadilo plufluu en la nokto.

La aerveturilo superflugis la maron de Arabio, Barato, Mjanmao kaj Ĉinio, la oceanojn Pacifiko kaj Atlantiko, Usonon, la sudon de Eŭropo kaj la nordon de Afriko, en vojaĝo, kiu rezultigis belajn bildojn.

• **HEROLDO ESTAS AĈETITA – ĜI RENASKIĜOS EN 2017**

"Heroldo de Esperanto" estas unu el la plej malnovaj Esperanto-gazetoj. Dum la lastaj jaroj ĉe la nuna eldonanto ĝi ofte malfruis, havis multajn problemojn – sed nun aperis espero pri ĝia revigliĝo.

Fabricio Valle (*la antaŭa redaktoro de la revuo Esperanto*) kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno "Sociala Grupo Lexus" en Brazilio, aĉetis la gazeton "Heroldo de Esperanto" kaj eldonos ĝin ekde la jarkolekto 2017.

La ĝisnuna eldonanto Kooperativo de Literatura Foiro (*membro de la pakto de G. Silfer*) respondecas ankoraŭ pri la tuta jarkolekto 2016. La vendo ne koncernas la rajtojn pri la libroj: la rajtoj restas ĉe LF-koop kaj IIC.

Informoj pri la planoj de Lexus rilate la gazeton, fonditan de Teo Jung, aperos regule ĉe la Facebook-paĝo de la nova eldonanto: <https://www.facebook.com/lexussociala/>

L.S.



• En VROCLAVO oni kantis kvarfoje ESPERANTAJN KANTOJN

La 7an kaj 8an de majo 2016 en Vroclavo – ĉi-jara Kulturĉefurbo de Eŭropo 2016 okazis jam la **4a EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ**. Preparis ĝin kune **Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo, Pola Esperanta-Asocio kaj Vroclava Centro de Pliiĝuloj**.

Ĉijaran Festivalon patronis **MILA VAN DER HORST KOLIŃSKA** kaj la **PREZIDANTO DE LA URBO VROCLAVO**.

Laŭ la regularo la festivalon partoprenas infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliiĝuloj. Ĉiu partoprenanto kantas **du kantojn**: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj. La Festivalo okazas **ĉiujare en majo** en du kategorioj:

1. **koruso aŭ ensemblo,**
2. **solisto.**

Sabate (la 7-an de majo) okazis **konkursa provaŭdo de partoprenantoj** en speciala lernejo por blinduloj - **DSOSW** Nr 13. Dimanĉe (la 8-an de majo) okazis la **Koncerto de la Premiitoj** en la prestiĝa loko **NACIA FORUMO DE MUZIKO** (Narodowe Forum Muzyki).

La publikon kaj la partoprenantojn dum la Koncerto de la Premiitoj salutis la iniciatintino de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj - Małgosia Komarnicka, kiu ankaŭ mallonge prezentis regularon de la festivalo. Akompanis ŝin JoMo, fama E-kantisto, kiu lerte gvidis la festivalon kaj fine kantis kelkajn E-kantojn.

Ĉi tiu festivalo havis rimarkeble pli altan nivelon ol pasintjaraj festivaloj kaj la ĵurio havis tre malfacilan taskon. Substrekis tion la prezidantino de la festivala ĵurio, konata ĥorestrino Barbara Szarejko. Ŝi estis asistata de profesia mizikistino kaj du geesperantistoj, ĉar oni pritaksis muzikajn kaj ankaŭ lingvajn valorojn.

La unuan premion en la kategorio „solisto” ĝis la aĝo 19 jaroj ricevis Izabela Żygadło kaj en la sama kategorio sed en la aĝo de 19 ĝis la 54 la premiojn ricevis Kazimierz Kudryński kaj Mieczysław Nitscĉke. La unuan premion en la kategorio koruso aŭ ensemblo ricevis duetoj „AliZet“ el Varsovio kaj „Bernadeta Czarnaĉka i Krystyna Kubiĉa“ el Vroclavo kaj la koruso „Apasjonata“ el Vroclavo. **La premiitoj ricevis diplomojn kaj pokalojn** kaj ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon pro la partopreno.

Ĉi-jare unuafoje ĵurio aljuĝis ankaŭ du premiojn pro akompanado. Ricevis ilin, Paweł Bogdała kaj Bartosz Jugo (la ĥorestro de la koruso ‘Apasjonata’).

La festivalan provaŭdon de partoprenantoj karakterizis familia etoso kaj dum la Koncerto de la Premiitoj la publiko ĝuis belajn kantojn en Esperanto kaj koncerton de JoMo, kiu komencis ĝin per kanto kun la premiita koruso „Apasjonata”.

Sumigante la penan laboron de ĵurio, ĝia prezidantino, Barbara Szarejko substrekis, ke ŝi estas fiera partoprenante en la festivala ĵurio kaj certe komencos lerni Esperanton kaj ke ŝi ne imagas pli bonan popularigon de Esperanto ol Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

La 4a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj precipe nun kiam Vroclavo estas – la Kulturĉefurbo de Eŭropo 2016 **bone fruktis**.

Ni jam invitas partopreni en **la sekva jubilea la 5a EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ**, kiu okazos en Vroclavo la 21an kaj 22an de majo 2017.

Por la estraro de la Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo
Małgosia Komarnicka



Infangrupo kantas



JoMO kun la koruso

• **KULTURA-INFORMA PROGRAMO de la Studenta Scienca E-Rondo de la Jagelona Universitato**

Jen la ĉefaj punktoj de la programo rilata al artistoj:

- de pluraj jaroj la rondo ĉiujare organizas, kadre de granda publika aranĝo, publikan koncerton en prestiĝa koncertejo (ties prestiĝo allogas bonajn artistojn);
- artistoj de la koncerto ricevas proponon aliĝi al allogaj, okazantaj eksterlande esperantaj (aŭ rilatantaj al E-o) muzikaj projektoj, senpagaj aŭ tre malmutekostaj (la financa faktoro de ilia decido partopreni kaj tiucele eklerni E-on estas ege grava);

- E-lernado, necesa por realigi tiun celon, estas proponata al ili.

E-INSTRUA PROGRAMO de la rondo

La pasintjara svedan aranĝon partoprenis kelkaj muzik-talentaj junulinoj (tio estis dirita en la antaŭa mesaĝo, ĉi-suba). Ili eklernis E-on ĝuste por partopreni tiun aranĝon. Ili estis instruataj de membroj de la rondo kaj studis parte solaj, entute sub didaktika gvido de la universitata instruistino, Maria Majerczak.

En 2014 la rondo kunlaboris kun artistoj de la konata Kabareto Loĉ Camelot, artista kelo, troviĝanta en la centro de Krakovo, tuj apud la Ĉefplaco (se oni volas havi ideon pri ilia arta nivelo: <https://www.youtube.com/watch?v=vWodN0FA2b8> - kun gastkantanta viro; <https://www.youtube.com/watch?v=X8IUd3OPH5U>, https://www.youtube.com/watch?v=o_R7qvQegzA).

Konkludo

Utilaj estas aranĝoj, dum kiuj oni povas lerni per E-o ion konkretan kaj seriozan, precipe tion, kio kontribuas al la homa evoluo intelekta, spirita, arta, teknologia k.a. La profesiaj celoj estas speciale gravaj por la junaj homoj, kiuj - komence de la profesia vojo - konstruas sian fakan kapitalon.

Maria Majerczak

• **Internacia festivalo Inter-Fest**

Mi volas informi vin, ke inter la 6-a kaj 12-a de aŭgusto 2017 kvar kroataj Esperanto-societoj kunorganizos grandan Internacian Festivalon INTER-FEST.

INTER-FEST estas novtipa Esperanta kultura festivalo.

INTER-FEST celas fariĝi rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo de programoj, kiuj al neesperantista medio prezentos praktikan uzeblon de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon.

INTER-FEST celas kuraĝigi la Esperantan kulturkreadon kaj levi la prestiĝon de Esperanto en la kultura kampo.

La programoj de INTER-FEST inkluzivos diversajn branĉojn de literaturo, teatro, muziko, filmo, sporto, klerigo, lingvolernado, interkultura interŝanĝo, turismo kaj aliaj aktivecoj, kiuj efektiviĝos per prelegoj, diskutrodoj, seminarioj, koncertoj, prezentaĵoj, konkursoj, sportaj eventoj, kolokvoj, ekspozicioj k.t.p.

La 1-a INTER FEST okazos en Bjelovar (Kroatio), 90 kilometrojn nord-oriente de Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio, de kie la festivala urbo facile atingeblas buse, trajne kaj aŭtomobile.

Bjelovar, la urbo kun 42.000 loĝantoj, estas sidejo de la Departemento Bjelovar-Bilogora kaj loko kun forta tradicio de Esperanto ekde 1909.

La temo de la 1-a INTER-FEST estas **KULTURA KUNFANDIĜO DE LA MULTETNA EŬROPO.**

Mi sendas al vi la festivalajn reklamilon kaj aliĝilon kaj petas vin diskonigi la informon inter viaj geamikoj.

Jam nun vi povas ankaŭ aliĝi kaj tiel sufiĉe frue plani vian tempon en 2017.

Bonvolu viziti ankaŭ la fejsbukan profilon de la festivalo:

www.facebook.com/profile.php?id=100012333463163


Sincere salutas,

Josip Pleadin (la festivala sekretario)

• **Simpozio en Vroclavo**



Simposio en Vroclavo



Valentina Wnuk

Kadre de la kvintaga Interkultura Majrendevuo, **la 5-an de majo 2016** en la Papa Teologia Fakultato en Vroclavo (Wrocław) okazis **la 2a Internacia Simpozio** titolita “Kiel sukcese instrui – didaktiko teorie kaj praktike”.

La simpozion por neesperantista publiko kaj esperantistoj interesiĝantaj pri la temo iniciatis kaj organizis la Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo ĉifoje kun la pola ILEI sekcio kunlabore kun neesperantistaj organizaĵoj Vinci Fit Art- Radość Życia, Akademia Leonarda Da Vinci - Złoty Wiek, Stowarzyszenie TuRazem.

Kun granda ĝojo mi aldonas, ke la Simpozion **patronis Universala Esperanto Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**.

Ĉe la komenco de la simpozio estis prezentita filmo pri efika lernado de la fremda lingvo preparita de **Marlon Couto Ribeiro** kaj **Anikó Szalay**. Profesorino **Ilona Koutny** (Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM) prezentis la prelegon pri instruado de vortoprovizo. **Maria Pokrzywnicka** (Etnografia Muzeo en Toruń) transdonis utilajn informojn kiumaniere kunlaboro kun muzeo helpas al instruistoj sukcese instrui. **Grażyna Szubryczyńska** (Infanĝardeno „Kangurek” en Toruń) preparolis kunlaboron de la toruna infanĝardeno „Kangurek” kun ĉina infanĝardeno Tian Mi kaj pruvis, ke infanoj de la toruna infanĝardeno belege adaptas ideojn de Esperanto. Dank’ al **Halina Kuropatnicka-Salamon** (Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo) la publiko eksciis pri la rolo de individuigado dum la instruado de personoj en la tria aĝo - vidantoj kaj blinduloj. Doktorigantino pri interlingvistiko **Malgorzata J. Komarnicka** (Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo) proksimigis al publiko brazilan edukistemon. **Magdalena Filcek** kaj doktorino **Ewa Aplaus** (Vinci Fit Art- Radość Życia kaj Akademia Leonarda Da Vinci - Złoty Wiek) preparolis spegulan skribadon, kiel sinkronigi ambaŭ duonglobojn de la cerbo kaj la profitojn de spiradekzercoj. Doktorino **Walentyna Wnuk** (Pedagogia Universitato) prezentis holisman disvolviĝon de la homo. **Barbara Despiny**, dr hab. Université Paris 1 Panthéon-Sorbonne resumis ĉiujn prelegojn finante la simpozion.

Post la sukcesa aranĝo **Ewa Rapacz** kune kun neesperantistoj preparis artan programon kaj komunan vespermanĝon por la organizantoj, prelegantoj kaj gastoj.

La Internacia Simpozio plenumis gravan rolon. La partoprenantoj havis eblecon redukti streson kaj streĉiĝon kaj pliiĝis senton de harmonio, paco kaj ekvilibro.

La simpozio ankaŭ montris, ke eblas interŝanĝo de sciencaj konkludoj kaj organiza kunlaboro esperantistaj kaj neesperantistaj medioj por komuna efiko, nome la altnivela, eduka aranĝo. La organizantoj ricevis petojn prelegi pri Esperanto kaj instrui la lingvon.

Ni jam invitas partopreni en la sekva, **la 3a Internacia Simpozio**, kiu okazos en Vroclavo la

19an de majo 2017 dum la 2a Interkultura Majrendevuo.

Małgorzata J. Komarnicka

prezidanto de

Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo

• **Aktivecoj kun infanoj**



Infanoj, finjara festo



Fotoj: Francoise Noireau

Afrikaj samideanoj aktivas

- Numero 78 Januaro-Marto 2016

ONDODAVERO

Trimonata informilo de TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando eldonata ekde januaro 1994

Redakcio : Parfo AJTO

p/a TIETo, B.P. 13169

Lome-TOGOLANDO

E-poshto : esp.togo@cafe.tg

Eroj el la Bulteno:

La numeralo SEPSA/SESPA

Okazis la sesa AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) en Togolando fine de decembro 2015. la sekva kongreso estos automate la sepa, sed shajnas, ke tiu numero sepa tute ne plaĉas al iuj esperantistoj. Tial ili evitas uzi ĝin. Por tamen doni ian numeralon al la kongreso, esperantistoj proponis la vortojn SEPSA au SESPA. Do, la dua sesa AKE estos la sepa au la sespa, se oni evitas uzi la vorton SEPA. Tiu ĉi afero okazas nur, jes nur en Afriko, la kontinento, kiun iuj teranoj metis en la lastan rangon.

Iam en 1989 la finnlanda organizo EMMAUS bojkotis la produktojn de SHELL. La klarigo estis, ke SHELL sendadis malbonajn produktojn al Afriko. Estis neniu pruvo pri tio. Tamen finno asertis, ke europaj entreprenoj produktas varojn nur por Afriko kaj aliajn por siaj landoj. Al Afriko oni sendadis duarangajn. Tiajn aferojn oni diras ankau en Afriko mem, kiam oni rimarkas, ke medikamentoj kun sama nomo, kiujn oni aĉetis en Afriko estas malpli efikaj ol tiuj, kiujn oni aĉetis en Europo. Tio similas al la vorto de la finno, ke produktojn oni fabrikas eksterafrike por sendi al Afriko, dum oni fabrikas aliajn por eksterafriko mem. El tio oni povos kompreni, ke eksterafrikanoj konsideras Afrikon, kiel lastvican kontinenton, kion afrikanoj konscie au nekonscie subtenas.

Ĉu pravas afrikanoj, kiuj luktas kontraŭ aliajn afrikanojn serioze laborantajn por la evoluo de Afriko ? Kion celas tiuj afrikanoj komplikoj de ekspluatantoj de Afriko. Ekzemploj abundas kaj la plej proksimaj estas tiu de Kompaore, kiu mortigis sian amikon Thomas SANKARA. Tia tendenco nestas ankau en Esperantujo, kie afrikaj esperantistoj alianciĝis kun eksterafrikaj esperantistoj por saboti la klopodojn de aliaj esperantistoj afrikaj favore la progresigon de Esperanto en Afriko.

Por la evoluo de Afriko, ĉiuj afrikanoj rajtas uzi la rimedon, kiu plaĉas al ili, sed afrikanoj ĉiel klopodu, ke ili ne uzu sian tempon preskau nur por fiaskigi la agadon honestan de aliaj afrikanoj. La agado de ACE/UETA nun estas tiom organizita, ke ĉiuj afrikaj esperantistoj profitu de ĝi por la vera progresigo de esperanto en Afriko. Tial ACE/UETA pretas kunlabori en la organizado de AKE 2016, kvankam la estraro de UEA kaj ties laborgrupo Afrika komisiono de UEA ne jam respondis la kunlaboran leteron de la prezidanto de UETA. La esperantistoj de UETA tamen arde pretigas sin por partopreni la kongreson en Tanzanio kaj klarigi al la partoprenantoj kio vere estas Esperanto en Afriko kaj kiel kunlabori efike por atingi bonajn rezultojn.

Kune estu afrikaj esperantistoj por vere labori efike por Afrika agado unusola. Por tiu unueco laboregas UETA kaj ĝia sidejo ACE.

UETA SESJARIĜAS

Alestimataj afrikanoj membroj de UETA (Unuiĝo de Esperantistoj en la Tuta Afriko)
Estimataj esperantistoj afrikaj
Karaj gesamideanoj,

Nekredeble, la afrikaj esperantistoj ene de UETA estas tre potencaj, energiaj kaj dinamika. Necesas vidi kiel ili brile organizis la sesan AKE (Afrikan Kongreson de Esperanto) en Togolando fine de 2015. AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) apartenas al neniu krom al afrikanoj, ĉar afrikano, pli precize togolanda esperantisto elpensis ĝin jam antaŭ la jaro 1995. Ĝi apartenas al neniu alia Esperanto-organizaĵo. Tial afrikaj esperantistoj zorgu mem pri ĝi. Tiukadre afrikaj esperantistoj ene de UETA povis propraposte organizi la sesan AKE en Togolando spite barojn kaj torpedojn de gvidantoj de UEA, dum aliaj esperanto-organizaĵoj subtenis ĝin. Necesas tie ĉi mencii la kunsenton

de la Esperanta Civito, kies vickonsulo persone partoprenis la kongreson kaj faris la festparoladon.

Alestimataj UETA-membroj tre potencaj,

Ni devas plumontri al la cetera mondo, ke ni vere estas tre kapablaj. Jam ni informis pri la okazigo de la oka AKE en Niĝerio, la naua en DRKongolando, ktp. Forton ĉian ni ja havas por tion fari. Tiam forton ni nun montras tra nia agado de la jaro. Kursoj diversaj okazos tra la kontinento, ne nur por lerni Esperanton, sed ankaŭ por instrui al afrikaj esperantistoj memsufiĉi por ne plu tro almozi. Esperanto-kurso teknika okazos, kaj la unua provo baldaŭ en Togolando. Raporto pri tiaj aferoj estos prezentataj dum la kongreso de Bunda en Tanzanio, kie UETA edukos la partoprenantojn pri Esperanto en Afriko.

Karaj kun-pac batalantoj, certe vi scias, ke Afriko estas la lulilo de la homaro. Ĉiuj civilizoj fontas el Afriko, de kie oni prenas la krudmaterialojn transformatajn ekster ĝi por riĉigi la transformantojn, verajn ekspluatantojn de la kontinento. Oni tiel senigis Afrikon je ties riĉaĵoj kaj potencaj homoj, kio ebligas tre facilan ekspluatadon de la kontinento. Kio pli gravas en la tuta sistemo ekspluata, tio estas, ke la kompliciĝo de afrikanoj mem nur pro propraj ventroj. Sen Mobutu, neniam oni povus mortigi Lumumba-n. Sen Kompaore, Sankara pluvivus, ktp. Kiam tiaj homoj aperas, tuj la ekspluatantoj de Afriko malaperigas ilin komplike kun afrikanoj mem. Io tia okazas ankaŭ en la Esperanto-movado.

La okazigo de la sesa AKE en Togolando nur malkashis la intencojn kiujn afrikaj esperantistoj havas pri siaj samkontinentanoj, kiuj sindediĉe laboras memstare por Esperanto en Afriko. Certe estas nun ankaŭ en la Esperanto-movado ekspluatantoj de Afriko. Ili sciu, ke UETA tute ne kalkulas je monsubtenetoj de esperantistoj por funkcii, ĉar ili havas proprajn sponsorojn esperantistojn kaj neesperantistojn en Afriko mem, kaj aldone, ili mem kotizos. La Esperanto-organizaĵoj, kiuj luktas kontraŭ UETA, sciu, ke UETA tute ne volas dividi kun ili la monon, kiun ili kolektas dirante ke ili helpas al Afriko. UETA havas propran rimedon per kiu ĝi povas mem helpi al aliaj esperanto-organizaĵoj tra la mondo. Tial UETA iras tute trankvila sian vojon, de sukcesoj al sukcesoj, kun la firma konvinko iam gastiĝi la Centran Oficejon de UEA en Afriko. Tiam oni vidas la veran internacian etoson en kiu funkcii asocio, kiun oni deziras tegmenteca en la tutmonda esperanto-komunumo.

Karaj gesamideanoj,

Togolandano diris: "La laboro de bubo en togolanda fora vilaĝo kontribuas al la evoluo de la tuta mondo, ĉar ankaŭ la bubo estas parto de la homaro, kies elementoj interligiĝas kaj interkonektiĝas ĉiam". La laboro de UETA okazas nur por antaŭenigi la tutmondan Esperanto-komunumon, neniam por kontraŭbatali iujn ekzistantajn esperanto-asociojn. Tial UETA ĉiam pretas kunlabori kun ĉiuj, kiuj tion volas. En UETA oni komprenas, ke subfosado de aliaj en sama rondo komuna tute ne antaŭenigas la rondon. Por Esperanto laboru ĉiuj ni esperantistoj, kaj tial ni ĉiam klopodu, ke la agado de iuj esperanto-grupoj ĉiam kompletigu tiujn de la aliaj, ke Esperanto atingu pli da homoj.

Nelson MANDELA diris: "Mi neniam perdas; se mi ne gajnas, mi lernas". Tial ankaŭ UETA ĉiam iras de sukcesoj al sukcesoj kiajn ajn estos la kondiĉoj en kiuj ĝi laboras. Baldaŭ aperos tre grava verko de Esperanto en Afriko. Temas pri VEKA (Verda Koloro en Anyronkope), la libro, kiu rakontas kaj raportas ĉion pri AKE de sia naskiĝo ĝis la sesa AKE en Togolando kun sintenoj de esperanto-organizaĵoj tra la mondo. Ĝi estas la libro pri la sesa AKE okazinta en la vilaĝo Anyron-kope de Togolando en decembro 2015. Ĝin eldonas ACE (Afrika Centro Esperantista).

MIRINDE ! Tre potencaj estas UETA-membroj, kio ebligas al ili ĉiam venki kaj superi ĉion por ĉiam gajni.

Afriko, antaŭen !ACE/UETA

Nia propagando

- La Tago de Esperanto- albana afiŝo



26 korrik - Dita e Esperantos, dita e drejtësisë gjuhësore.

Përse Dita e Esperantos? Përse ajo është e rëndësishme për mbarë botën tani?



Më 26 korrik 1887 doli libri i parë i gjuhës ndërkombëtare **Esperanto**. Gjuha nmdërkombëtare Esperanto ka për qëllim të përdoret për lidhjet ndërmjet njerëzve me gjuhë të ndryshme, që do flisnin kaq asnjansisht dhe komunikimi ndërmjet tyre do ishte i drejtë. Askush s'ka të drejtë ta ndjejë veten epror mbi tjetrin. Secili të flasë gjuhën e vet.

• *Ne i sugjerojmë botës të adoptojë 26 korrikun si ditë e komunikimit të drejtë dhe si rrjedhojë i marrëdhënieve të drejta ndërmjet etnive, kulturave, popujve.*

Një komunikim i drejtë është një situatë komunikimi ndërmjet njerëzve, ku të gjithë kanë mundësi të barabarta. Është e qartë se në se disa njerëz kanë të drejtë të flasin në gjuhën e tyre amtare ndërsa të tjerë duhet të flasin në një

gjuhë të huaj, nuk do ketë një situatë të tillë barazie.

Duke zgjedhur një rënë ose disa gjuhë përmbi të tjerat, jepet një shenjë për më shumë rëndësi apo sundim atyre, për të cilët gjuhët e përdorura janë gjuhë amtare. Kjo zgjedhje bëhet një mjet për t'i përjashtuar njeërzit nga politika, edukimi, qasja në tregti dhe shumë aspekte të tjera të jetës. Kjo i forcon pabarazitë sociale ekonomike ndërmjet grupeve.

Ka të drejta gjuhësore të njerëzve dhe ka të drejta njeërzore me një përmbajtje gjuhësore. Liria e të vetëshprehurit dhe përdorimi i një gjuhe janë të pandashme. Përvojat rreth botës tregojnë që politikat shumëgjuhësore mund t'i zmadhojnë shanset për njerëzit në shumë mënyra. Ajo që një botë e barabartë ka nevojë është formula tregjuhësore, që është rekomanduar nga UNESCO, që jep njohjen publike të përdorimit të tri gjuhëve: amtare, shtetërore/rajonale, ndërkombëtare.

- Gjuha amtare. Njerëzit dëshirojnë dhe kanë nevojë të mund të përdorin gjuhën e vet amtare kur kjo nuk është as rajonale as ndërkombëtare.

- Gjuha e një shteti/rajonale. Gjuha e një shteti lehtëson komunikimin ndërmjet grupeve gjuhësore të ndryshëm- si për shembull svahilishtja në vendet afrikanolindore, ku fliten edhe shumë gjuhë të tjera.

- Një gjuhë ndërkombëtare. Në këtë epokë të globalizmit, të gjithë njerëzit duhet të jenë kompetentë në një gjuhë asnjansë ndërkombëtare që i vë të gjithë popujt në nivel të njëjtë, kur bëhet fjalë për komunikimin ndërkombëtar.

Shtetet kane nevojë t'i njohin te gjitha tri gjuhët si gjuhe zyrtare apo të paktën ta njohin përdorimin e tyre dhe mësimdhënien e tyre. Ka shumë versione të këtyre formulave trigjuhësore, varësisht nga shteti. Ndërkohë është e mundëshme dhe e dëshirueshme që

shteti të mbetet "asnjanës" për etnitë dhe fetë, por kjo nuk është e mundëshme për gjuhën. Njerëzit në botë dhe qytetarët në vendet e veçanta kanë nevojë për një gjuhë të përbashkët për ta shpënë përpara ndërkuptimin e ndërsjellë dhe komunikimin me ndikim, por njëkohësisht kanë të drejtë ta përdorin gjuhën e vet amtare.

Gjuha ndërkombëtare Esperanto ofron një mjet asnjanës për të siguruar të drejta njerëzore gjuhësore në nivel ndërkombëtar. "Nga të gjitha gjuhët e planizuara të botës, Esperanto është sot më e njohura dhe më e përdorura. Sipas meje, ajo do sjellë shumë përparësi, po që se njerëzit do e marrin atë seriozisht... Esperanto ka nevojë për më pak kohë studimi se sa çdo gjuhë tjetër natyrore, sepse çdo kush mund të krijojë lirisht fjalë të reja" (sipas gjuhëtarit të njohur botërisht [Dr. Tove Skutnabb-Kangas](#)). Ajo, veç kësaj pengon hegjemonizmin e fuqive të mëdha të momentit. Këto fuqi tani janë vendet anglishtfolëse dhe prandaj anglishtja është bërë kaq e fuqishme nëpër botë. Por, si do jetë e ardhmja, pas 50 vitesh? "Përforcimi i të drejtave të folësve të të gjitha gjuhëve është një çështje për të cilën Esperanto jep një ndihmesë të qënësishme" (sipas një gjuhëtari tjetër të njohur, [Robert Philipson](#)).

Është koha të mos mendojmë të ndjekim më të fortët e kohës, por të nisim punën për krijimin e një situatë barazie ndërmjet popujve të botës.

- *Esperanto është një mjet për të arritur një komunikim të drejtë.*

Bardhyl Selimi, Shoqata esperantiste shqiptare

[Kongresi 100 Universal i Esperantos
në Lille, Francë, nga 25 korrik gjer 1 gusht 2015](#)
[Tema: "Gjuhët, artet dhe vlerat në dialogun ndërmjet kulturave"](#)

- **Artikolo pri Esperanto en revuo itala-albana**

Jen revuo publikigita en Italio de s-ro Hasan Aliaj kie aperis artikolo pri Esperanto. La nomo de la revuo estas RRËNJËT - La Radikoj

Të mësojmë Esperanto Per imparare l'Esperanto

Nga LUELA MYFTARI

Esperanto është gjuhë që lindi si nevojë për të unifikuar njerëzit. Për a do të mund ta kishim një krah për ashtu siq ishte shprehur përpunuesi i kësaj ideje...

dijëka që t'i shprehje të nesërmen këtyrë vendi dhe këtyrë të rinjtë. "Edhe pse Esperanto ka 116 vjet që ka ardhur në Shqipëri nga Luter Shantaja, unë mendoj se ka ende shumë punë për të bërë" thotë profesor Bardhylj Penioni...



FAKTE A do të kemi një gjuhë të përbashkët?

Gjuhë esperanto është prezantuar për herë të parë në një projekt të realizuar nga Ludwik Lejzer Zamenhof. Ai ishte nga Dailistok, një qytet verior në Poloni dhe ishte origjini i tij. Që në fillim të shkollës, ai kishte dëshirë të mësojë...

LEKSION Për të kuptuar realitetin se si tingëlton Esperanto, gjuhë që lëshohet njëllësi si edhe shkruhet, ne du të jemi të shtyllshëm dhe shprehim. Te gjitha këto na i përcillojnë profesorët nga lloji i tij "Ça vi parolas Esperanto?".

Esperanto është një gjuhë që lindi si nevojë për të unifikuar njerëzit. Për a do të mund ta kishim një krah për ashtu siq ishte shprehur përpunuesi i kësaj ideje...



Fin da bambino, l'uscita polacca pensava che le persone dovrebbero essere unificate in una sola lingua. Anche se Esperanto dispone di 126 anni è stato presentato a noi, vive ancora oggi. Anche a mostrare un grande interesse in tutto il mondo.

Esperanto. In questo linguaggio sono tradotti grandi opere della letteratura mondiale. Se la letteratura italiana "Bardhylj" si dice: "Insieme al mio amico Tomas Sajnlek polacca, ho lavorato per parecchio alcune opere come".

Per capire davvero come suona Esperanto, la lingua si legge come è scritta, potremmo alcuni esempi. Tutti questi vengono conosciuti al professore dal suo libro "cu vi parolas Esperanto".

Rivista in lingua Esperanto ed è pubblicato sotto il titolo "Monato", corrispondente albanese di "Monato" indica "Century" che non vi è alcun sostegno economico per diffondere questa lingua in Albania.

Esperanto. In questo linguaggio sono tradotti grandi opere della letteratura mondiale. Se la letteratura italiana "Bardhylj" si dice: "Insieme al mio amico Tomas Sajnlek polacca, ho lavorato per parecchio alcune opere come".

LEZIONE Per capire davvero come suona Esperanto, la lingua si legge come è scritta, potremmo alcuni esempi. Tutti questi vengono conosciuti al professore dal suo libro "cu vi parolas Esperanto".

Esperanto. In questo linguaggio sono tradotti grandi opere della letteratura mondiale. Se la letteratura italiana "Bardhylj" si dice: "Insieme al mio amico Tomas Sajnlek polacca, ho lavorato per parecchio alcune opere come".

LEZIONE Per capire davvero come suona Esperanto, la lingua si legge come è scritta, potremmo alcuni esempi. Tutti questi vengono conosciuti al professore dal suo libro "cu vi parolas Esperanto".

Esperanto en la progresigo de Afriko

Esperanto tute ne plu estas io nova por afrikanoj, jes por afrikanoj, jes por afrikanoj, jes por afrikanoj. Jam pli ol 40 jarojn Esperanto atingis Afrikon. Antau ol ĝi ankaŭ aliaj ideoj atingis la kontinenton.

Tuj necesas scii pri la ideoj de Hans BAKKER. Vidu, ke Hans povis paroli al la

tuta esperantistaro kelkajn semajnojn antaŭ sia morto : <<VORTOJ GRAVAJ de Hans BAKKER la 26-an de decembro 2014 : GBEGLO Koffi demandis s-ron Hans BAKKER : "Kion vi celas zorgante pri afrika agado".

Hans BAKKER respondis: <<Mia celo estis la evoluo kaj emancipiĝo de Afrikanoj.

Esperanto estas rimedo en tio. Lernejo estas alia rimedo en tio>>.

Evidentas la ideoj de Hans por Afriko pere lia ties Afrika Agado. Kaj Hans faris mamuton. Pluraj miloj da afrikaj esperantistoj povis lerni en metiejoj, lernejoj/universitatoj kaj hodiaŭ kontribuas al la progresigo de Afriko. Tion Hans faris propranome por iel helpi al afrikanoj helpi sin kaj ankau sian kontinenton. Eble Hans inspiriĝis de tio, kion faris religioj en Afriko. Ni vidu !

La religioj importitaj al Afriko alvenis ankau kun siaj kredaĵoj. Tiujn ĉi ili uzis por atingi siajn celojn, eĉ se por ekspluati Afrikon, ili tamen certgrade helpis ankau en la progresigo de Afriko. Unuaj instruoj afrikaj povis edukiĝi dank'al lernejoj de la koloniistoj. Rigardu kiom da katolikaj edukejoj, islamaj centroj, ktp abundas en Afriko. Iliaj kontribuoj koncernis ne nur la edukadon sed ankau la vivtenon de afrikanoj, kiuj laboras diligente antaŭ ol ricevi siajn salajrojn. Rekonindas, ke tiuj kredogrupoj faris kaj plufaras multon bonan siamedian al Afriko. Ĉu ankau Esperanto ion tian faras ?

Supre aperis la kontribuoj de la koloniistoj-religiuloj al Afriko, sed tute ne menciigis lingvoj. Tamen jes, la koloniistoj laboris per siaj respektivaj lingvoj, kiuj plejparte estas nun laborlingvoj en Afriko. Do, per la lingvoj la kredogrupoj povis ion fari al Afriko. Same, per Esperanto esperantogrupoj povus ion pozitivan alporti al Afriko.

La unua afero, kiun oni povas noti, estas la klopodoj de Hans BAKKER. Vere, neniu esperantisto nun same faras kiel Hans. Li vere edukis afrikanojn ne nur Esperante, sed ankau ideale/morale. Li ĉiel akompanadis ilin al iliaj respektivaj feliĉoj. Gravus en tio la lernejo Instituto Zamenhof nun en Togolando, per kiu centoj da junuloj instruiĝas ĉiujare ekde 2004 kaj deko de ĵusdiplomitoj ricevas vivtenon.

Hans estas unuopulo, kaj tion grandan faris. Kio pri la Esperanto-organizaĵoj ?

Necesas tuj distingi la diversajn Esperanto-organizaĵojn. Oni ja scias, ke estas por Esperantaj organizaĵoj kaj per Esperantaj. Kiuj povus ion utilan fari por la progresigo de Afriko, tio estu per Esperantaj. Tiuj ĉiel klopodas uzi Esperanton por ion alporti al la homaro, do ankau Afriko profitu de ĝi. La Por Esperantaj ĉiom alkroĉiĝas nur al disvastigo de Esperanto, ke ili luktas preskau nur por sia gloro, oferante Esperanton sur altaron de forgeso. Kvankam spertaj esperantistoj ĉiam atentigas, ke gravas, ke oni aldonu ion al lernado de esperanto, ĉar paroli nur pri Esperanto enuigas homojn.

SAT, la Esperanta Civito kaj MAS ĉiam trankvile agadas en Afriko, instruante al afrikanoj prizorgi sin uzante Esperanton. Tiuj asocioj estas per Esperantaj. Male, UEA per siaj nunaj gvidantoj luktas kontraŭ afrikanoj, kiuj agadas pli per ol por Esperanto. Kontraŭ tiuj ĉi afrikaj esperantistoj per Esperante agadantaj batalas UEA-gvidantoj kaj klico de afrikaj esperantistoj. Kiuj iomete sekvas kiel afrikanoj proprarimede okazigis la sesan AKE-n en Togolando fine de 2015 kontraŭ la torpedoj de UEA-gvidantoj kaj ties laborgrupeto Afrika komisiono de UEA, tiuj komprenas, ke la progresigo de Afriko pere de Esperanto tute ne eblas en la manoj de nunaj UEA-gvidantoj. Kion ili celas en Afriko, tio neniel estas la progresigo de Afriko, sed ion tute alian kion ili mem nomu. Ĉiam ili entreprenas aferojn por nenigi tion kion faras la afrikaj esperantistoj, kiuj tute ne volas esti komplikoj kun ili en ilia laboro por submetigi Afrikon verdan al ili. Afriko sciu per kiuj Esperanto povos ion alporti al ĝia evoluo.

Kiel afrikanoj laboras diligente kun la koloniistoj seriozaj ĝis iagrade sendependiĝi por nun atingi kontentigan nivelon, tiel same ili faru per Esperanto. Lerni lingvojn neafrikajn ne estu celo, sed rimedo por progresigi Afrikon. Tial neniu porlingva/porleligia grupo povos kontribui serioze al la evoluo de Afriko,

ĉar tiaj porlingva/porleligia tendenculoj tiom alkroĉiĝas al siaj doktrinoj, ke ili uzas ĉiajn rimedojn por malutili konscie/senkonscie al afrikanoj, kiuj ne volas sekvi ilin, kaj tial ili malutilas ankau al Afriko. Klaras, ke la emancipiĝo pri kiu parolis Hans okazos neniam per nunaj UEA-gvidantoj, ĉar ili tute ne volas tion. Kio gravas por tiuj nunaj UEA-gvidantoj, tio estas nenio krom surtreti ĉiujn homojn kiuj ne agadas kiel ili, kaj tial dividi Afrikon por regi. Ne per tia agado oni kontribuu al progresigo de Afriko. Afrikaj esperantistoj sciu nun, ke la konduto de nunaj UEA-gvidantoj tute ne kontribuas al progresigo de Afriko. Kiuj vere kontribuas al progresigo de Afriko pere de Esperanto tiuj estas la esperantistoj kaj esperanto-organizaĵoj, kiuj sekvas la ideojn de Hans BAKKER, kaj tiuj estas preskau nur la esperantistoj kaj esperanto-organizaĵoj agadantaj ne POR sed PER Esperanto.

- **Esperanto en restoracioj**

Esperanto-Restoracio en Brazilo

Estimataj: Bonvole alklaki por vidi interesan restoracion kie geesperantistoj renkontiĝas por vespermanĝi, interbabili kaj kompreneble diskonigi la zamenhofan lingvon.

Mi antaŭdankas pro la resendo al viaj eventualaj kontaktuloj, ĉu?

Fratamike,

Evandro, el Brazilo.

-





Esperanto en bildoj

Nutraĵoj, kuiradoj



kaĉo



muslio



omleto



ovo



pastopoŝetoj



supo



nudeloj



fiŝoj



orizo



suŝio



pano



buterpano



sandviĉo

La nomoj de la Suno

La nomoj de la suno



Linda desegnas sunon.

Sandro skribas: SOLE. Tio estas la nomo de la suno en la lingvo de Sandro kaj Linda. Ili estas italaj geknaboj. SOLE estas la itala nomo de la suno.

Sumbu skribas: LISUBA.

En la lingvo de Sumbu tio estas la nomo de la suno.

Ĉu Noriko skribas aŭ desegnas?

Ŝi skribas!


太陽 Tio estas la japana nomo de la suno.
Noriko legas tion: *taj jo.*


Kiom da sunoj estas en la ĉielo?



estas nur **UNU**.

Sed en la mondo estas **mil kaj mil LINGVOJ** kaj la suno havas tre, tre multajn nomojn.





Kiom rapide oni povas lerni la lingvojn

Kiom da horoj vi bezonas lerni por paroli flue fremdajn lingvojn?



2200 horoj




2000 horoj



1500 horoj



1000 horoj



150 horoj

Instituto pri Kibernetika Pedagogio
de la Universitato de Paderborn
(Germanio) por francalingvanoj

Jacinto Foguel

CURSO DE ESPERANTO

Inscrições de 8 a 22 de junho de 2016
presencialmente na Biblioteca Municipal

Acesse goo.gl/z8nnZb para mais informações sobre o esperanto

SALUTON!

BONAN
TAGON!

BONVOLU

ĜIS!

JES

BONEGE!

o keĵ


DANKON!

curso gratuito

Aos sábados
das 8h00min às 10h00min

Na **Biblioteca Municipal Arno Viunski**
Rua Morom, 2019, Passo Fundo - RS

Início das aulas
em **25 de junho/2016**



TABULO

ŜAKO

PEONO



TURO



ĈEVALO



KURIERO



REĜINO



REĜO



ĴETO DE PREZOJ



CHARGEONLINE.com.br - © Copyright 2008

Piedpilko / Futbalo



ludanto,
futbalisto,
piedpilkisto




golulo




sportvesto



ŝorto



futbalejo



flago



ludestro
(ludjuĝisto)



zeloto




futbalŝuoj



ŝtrumpetoj



golejo



fajfilo



trejnisto




teamo



ŝalo




pilko



ruĝa karto
flava karto



pokalo



FOME ZERO



FRUKTOJ



Puisque le cheboeuf est au menu, voici une leçon d'espéranto qui convient pour tout animal, vu que le substantif, le féminin, la descendance, l'adjectif, l'adverbe et les mots dérivés se forment selon le même principe.

cheval	ĉevalo	o = substantif
chevaux	ĉevaloj	j = pluriel
jument	ĉevalino	in = féminin
poulain	ĉevalido	id = descendant
pouliche	ĉevalidino	id + in = descendant féminin
étalon	virĉevalo	vir = mâle
haridelle	ĉevalaĉo	aĉ = péjoratif
écuyer	ĉevalestro	estr = substantif
palefrenier	ĉevalisto	ist = profession
éleveur	ĉevalbredisto	bred/i = élever
haras	ĉevalbredejo	ej = lieu
maquignon	ĉevalvendisto	vend/i = vendre
concours hippique	ĉevalkonkurso	konkurso = concours
course de chevaux	ĉevalkurado	ad = action continue
troïka	ĉevaltrio	trio = trio
piste cavalière	ĉevalvojo	voj = voie
du cheval	ĉevalaĵo	aĵ = chose concrète
écurie	ĉevalejo	ej = lieu
hennir	ĉevalbleki	blek/i = crier
crottin	ĉevalfeko	feko = excrément
crin	ĉevalharoj	haroj = poils
peau de cheval	ĉevalfelo	felo = peau d'animal
brosse de pansage	ĉevalbroso	broso = brosse
chevalin (e)	ĉevala	a = adjectif
à cheval	ĉevale	e = adverbe
mettre en selle	surĉevaligi	ig/i = rendre, faire devenir...
sauter à cheval	surĉevaliĝi	iĝ/i = devenir
équestre	ĉevalrajda	rajd/i = monter à cheval






**MI ĴURAS AL VI DU,
KE MI NE DRINKIS!!!**




Vegetaloj



Gabriel "SKEDAR" Taranto



skedar.net



Helposignoj

HELPOSIGNOJ

.	punkto	*	steleto aŭ asterisko
,	komo	“ ”	citiloj
:	dupunkto	'	apostrofo
;	punktokomo	/	suprenstreko
...	tripunkto	-	dividostreko
()	krampoj	—	haltostreko
?	demandosigno	!	krisigno

Problemetoj

REZONU LOGIKE

$$\text{Horse} + \text{Horse} + \text{Horse} = 30$$

$$\text{Horse} + \text{Horseshoe} + \text{Horseshoe} = 18$$

$$\text{Horseshoe} - \text{Boot} = 2$$

$$\text{Boot} + \text{Horse} \times \text{Horseshoe} = \text{????}$$

$$\text{horse} + \text{horse} + \text{horse} = 60$$

$$\text{horse with spear} + \text{horse with spear} - \text{spearman} = 70$$

$$\text{archer} + \text{spearman} = 90$$

$$\text{horse} \times \text{archer} + \text{spearman} = ?$$

Sporto



Medalo




Edukado



Niaj vojaĝoj

Nia amiko Pedro denove entreprenis longan vojaĝon tra Orienta Eŭropo



En Lituanio






Daŕe en Lituano, Vilnjus



Estonio





Pedro ne Petersburg



En Rusio

- Sudkoreanoj reklamas Esperanton dum siaj vojaĝoj

(En Irano, Pakistano)














En Irano













adiaña festo
cê la domo de gastiganto en tehrano

테헤란 민박집의 마지막 잔치







- Tre malofte la bulvardo aspektas tiel pompa, kiel kiam floras jakarandoj.






Se estus iom malpli da polvo kaj fumo, la jakarando certe ridetus pli multe en Katmanduo. Ĉefe du specoj de jakarando troviĝas en Nepalo – [*Jacaranda mimosifolia*](#) kaj *Jacaranda ovalifolia*.

La plejparto de literaturo diras, ke la jakarandoj trovataj en Nepalo estas *Jacaranda mimosifolia* kaj *Jacaranda ovalifolia*. Sed troviĝas multe pli da specoj.

Rigardu pli da belaj fotoj de jakarandoj en plena florado:



Jakarando sub la lumfosto.



Somero, Katmanduo kaj jakaranda arbo en plena florado, vere ebrügaj.

Multaj nepalanoj erare nomas la jakarandon “shirish”:



Floroj de shirish jam floras, kaj [mia] koro ne floras.

Longedaŭra konfuzo de jakarando kaj shirish inter nepalanoj devenas de la fama romano “[Shirish ko Phool](#)” (Floro de Shirish) verkita de la konata nepala verkisto [Parijat](#).



[Kashish Das Shrestha](#) @kashishds

- Kathmandu's [@Durbarmarg](#) today; rarely does the blvd look as gorgeous as it does when its [#jacaranda](#) are in bloom.

Artikoloj

Hans BAKKER faris multon al Afriko

Kara Administranto de ACE;

Mi ĵus legis vian longan mesaĝon kun klarigoj pri diversaj laboroj de Sinjoro Hans Bakker en nia kontinento(Afriko). Kompreneble, Hans Bakker faris multon pri Esperanto en Afriko ekzemple : Konstruaĵo de lernejo en Togolando.Li penis trasendi multajn lernomaterialojn al diversaj E-kluboĵ en Afriko kaj en 4 kontinentoj.

Tiu ĉi estis bona viro ĉar li havis veran amon por la tuta mondo. Komprenu, ke trovi tiajn virojn kun tia amo ne estas facile en la mondo. Efektive, ni afrikanoj, sekvu la saman vojon, kian Hans Bakker faris.

Mi amas Esperanton multe, ĉar estas lingvo, kiu kunigas homojn de la tuta mondo. Mi mem havas demandon jenan: Ĉu eblas, ke en aliaj afrikaj landoj oni povas krei esperantajn lernejojn? Tiam, mi scias ke estas iuj landoj, kie estas esperantistoj kiuj ne havas tian rimedon por konstrui eĉ tri ĉambrojn pri E-lernado. Ekzemple: En orienta provinco Kivu/DRK ne ekzistas plu konstruaĵo pri E-kurso. Mi konceptis ideon por krei almenau etan konstruaĵon de tri ĉambroj en nia orienta provinco Kivu. Do, 1 ĉambro por la komencantoj en esperanto, 1 por la progresintoj, 1 por la kunvenejo kaj biblioteko de tiu E-centro. Iam, se tiu ĉi E-centro povas naskiĝi en nia loko, estus tre interese por la mondo. Cetere, se tiu ĉi tuj estas starigita en nia medio, ĉiuj kongaj intelektuloj ne povos neglekti precipe nin kaj esperanton en Afriko. Ĝis nun multnombraj intelektuloj neglektas esperanton. Nun, kiel ni povos krei ĝin en nia medio? Kie ni povas trovi la verajn homojn, kiuj povas subteni por ke ĝi estu starigita? Lau historio mi jam legis multe pri Hans pri la kreo de Izo/Togo.Hans Bakker penis kaj klopodis serĉi la monon por konstruigi tiun lernejon. Kiel ni povos trovi aliajn bonvolulojn, kiuj povas subteni nin pri tiu afero? La tuta mondo scias ke en orienta provinco Kivu estas parto, kie la milito okazis multfoje.Tio estas, ke ĉiuj orientanoj estas malriĉaj. Estas regiono kiun oni povas helpi forte.Plie, al ni, orientanoj, ne facilas partopreni al diversaj E-renkontiĝoj, kiuj ofte okazas en Togolando (AKE/Togolando eĉ en aliaj afrikaj landoj kiel Suda Afriko, Benino, Kenio... Samideane via Honore el Orienta provinco kivu.

• La tre konata kaj grava Homo J. KRISHNAMURTI proponas ion al ni en sia libro EDUKO kaj VIVSIGNIFO.

Nescianto estas ne tiu neklera, sed tiu, kiu ne konas sin mem. Klerulo estas stultulo, kiam li serĉas komprenon en libroj, en scikonoj, ĉe eminentuloj.

Kompreno alvenas nur al kiu konas sin mem, tio estas al kiu perceptas sian tutan psikan procezon. Eduko, do, versence estas memkompreno, tial en ĉiu el ni koncentriĝas la totalo de ekzistado.

Kion nuntempe oni nomas eduko, tio estas amasigo de informoj kaj perlibraj scioj, atingeblaj de ĉiu ajn legpovulo. Tia lern-formo proponas subtilan rimedon por eskapi, kaj samkiel ĉiuj fuĝoj el ni mem, ĝi neeviteble pliiĝas nian malfeliĉon. Konfuzo kaj konfliktoj rezultas el niaj misaj rilatoj al personoj, aĵoj, ideoj, kaj tiel longe dum ni ne komprenas nek modifas tiujn rilatojn, lernado, informkolektado, lertec-akiro, certe kondukas nin nur al hhaoso kaj detruo.

Lau la nuna sociorganizo, ni sendas niajn gefilojn al lernejo, por ke ili lernu arton au sciencan, per kiu ili iam povos perlabori sian vivon. Ni volas fari el nia infano unue kaj ĉefe specialiston kaj tiel doni al li tutcertan ekonomian stabilon. Sed ĉu lerni teknikon iel faras nin kapablaj kompreni nin mem ?

Kompreneble, necesas, ke ni sciu legi kaj skribi, ke ni havu metion kaj profesion, sed ĉu tiu sci-formo naskas kapablon kompreni la vivon ? Tutcerte ne. Do, se tekniko estas nia nura celo, ni evidente neas la esencon de nia vivo.

Vivo estas doloro, ĝojo, belo, malbela, amo. Kiam ni komprenas ĝin entute, tiu kompreno, je ĉiu nivelo, kreas sian propran teknikon. Sed la malo ne okazas : tekniko neniam naskos kreivan

komprenon.

Niatempe eduko estas ega fiasko, ĉar ĝi tro taksas teknikon. Tro gravigante teknikon, ni detruas la homon. Kulturante kapablon kaj eficienton sen kompreni la vivon, sen kompreneme percepti la funkciadon de penso kaj deziro, ni disvolvas nian krudecon, ni estigas militojn, kaj fine endanĝerigas nian fizikan sekurecon. Ekskluziva disvolviĝo de tekniko produktis scienculojn, matematikistojn, pontokonstruistojn, spacokonkerantojn, sed ĉu tiuj komprenas la totalan vivprocezon, ĉu specialisto povas percepti la vivon kiel tutajn? Jes, nur kiam li ĉesos esti specialisto.

Teknologia progreso solvas iajn problemojn, por iuj personoj, sur iuj niveloj, sed ĝi ankaŭ estigas pli ampleksajn kaj pli profundajn konsekvencojn. Vivi sur certa nivelo, ne konsiderante la totalan vivprocezon, estas alvenigi mizeron kaj detruon. La plej granda bezono, la plej urĝa problemo por ĉiu individuo estas havi integran vivkomprenon, kiu ebligas al li kontentige solvi la daŭre kreskantajn vivkompleksaĵojn.

Teknika kono, kvankam necesa, neniel solvos niajn spiritostrebojn kaj internajn psikajn konfliktojn. Kaj nur ĉar ni akiris teknikajn konojn sen kompreni la totalan vivprocezon, tial teknikoj fariĝis instrumentoj por nia memdetruo. Homo, kiu scias diserigi la nukleon sed ne havas amon en sia koro, fariĝas monstro.

Ni elektas profesion laŭ niaj kapabloj. Sed ĉu sekvi emon liberigos nin el niaj konfliktoj kaj el nia konfuzo? Vershajne ni bezonas ian teknikan preparon, sed, akirinte la diplomon de inĝeniero, kuracisto, advokato, kion ni atingis? Ĉu profesiado estas vivefektiviĝo? Vershajne tiel estas por multaj el ni. Niaj profesioj povas okupigi al ni la plejparton de niaj vivoj, sed tiuj niaj produktaĵoj mem, kiuj tiel ravas nin, kaŭzas nian detruon kaj nian mizeron. Nia sinteno kaj niaj valoroj transformas niajn okupojn kaj nian mondon en ilojn de envio, amaro kaj malamo.

Sen la kompreno pri ni mem, ĉiuj niaj okupoj alvenigas senigon, frustron, kun ties nepraj eskapoj tra ĉiuspecaj damaĝaj aktivecoj. Tekniko sen tiu interna kompreno kondukas al malamikeco kaj krudeco, kiujn ni provas kashi per belsonaj frazoj. Kion valoras tiom taksita teknikon kaj fariĝi eficientaj entoj, se rezultas reciproka detruo? Nia teknika progreso estas mireginda, sed ĝi nur pliiĝis nian povon detrui ni unu la alian, kaj mizero kaj malsato ĉieas sur la tero. La homaro ne estas paca nek feliĉa specio.

Alia faktoro en tiu kulturo estas, ke ĝi donas al ni senton pri sekuro ne nur ekonomia sed ankaŭ psika. Trankviligas la scio, ke ni estas eficientaj kaj kapablaj. Scii, ke ni kapablas ludi pianon aŭ konstrui domon, tio donas al ni impreson pri vivenergio, agreseman sendependecon. Sed konsideri grava nian kapablon, nur pro nia deziro havi psikan sekuron estas nei la vivplenecon. La totalan viv-enhavon neniam ni povas antaŭvidi, ĝin ni devas percepti denove de momento al momento, sed ni timas tion nekonatan, kaj tial ni starigas por nia sekuro zonojn de psika protekto per sistemoj, teknikoj kaj kredoj. Kaj tiel longe dum ni celos internan sekuron, la totala vivprocezo ne estos perceptebla por ni.

Bona eduko, tamen samtempe stimolante lernigon de tekniko, devus plenumi ion multe pli gravan: ĝi devus helpi la homon percepti per eksperimento la integritan vivprocezon. Nur tiu rekta eksperimento donos al kapablo kaj tekniko la ĝustan lokon. Ĉar, sume, kiam ni havas ion por diri, ĝia esprimo mem kreas la stilon, sed krei stilon sen senti ĝin interne, povas nur esti artefarita esprimmaniero.

En la tutmondo, inĝenieroj persistegas koncepti mashinojn funkcionantajn sen homa kunlaboro. En vivo preskaŭ entute servata de mashinoj, kio fariĝas la homoj? Ili havas pli kaj pli da libertempoj, sed ne scius uzi ilin prudente. Ili serĉas fuĝojn en erudicio, en stultigaj amuzoj, en idealoj.

Mi kredas, ke oni verkis multajn volumojn pri idealo en edukado, kaj tamen nia konfuzo pri tiu temo neniam estis pli granda ol nun. Ne povas ekzisti metodo por instrui integriĝon kaj liberon. Tiel longe, dum gravas por ni principoj, idealoj, metodoj, ni nenion faras por helpi la individuon liberiĝi de sia propra egocentra aktiveco kaj de ties angoroj kaj konfliktoj.

Neniu idealo, neniu utopia plano pri Estonta Civito estigos la radikalan transformiĝon de l'koroj,

kiu ĉefas, se oni volas neniiĝi la militon kaj eviti tutmondan detruon. Neniu idealo kapablas modifi niajn aktualajn valorojn. Tiujn ĉi oni povas forĵeti nur per vera edukado, bazita sur la kompreno pri "tio estanta".

Kiam ni kunlaboras por idealo, por estonteco, ni modlas individuojn laŭ nia koncepto pri l'estonteco ; ili ne interesas nin kiel homestaĵoj, ĉar interesas nin nur nia ideo pri kio devus esti tiuj individuoj. "Kio devus esti", fariĝas por ni multe pli grava ol "kio estas", nome la individuo kun ĝiaj kompleksaĵoj, tiaj kiaj ili ekzistas. Sed se ni ekkomprenas la individuon rekte, anstataŭ rigardi ĝin tra la ekrano de nia bildo pri "kio ĝi devus esti", tiam tuj okupas nin "kio estas". Kaj ni ne plu provas transformi la individuon ; nia ĉefa intereso estas helpi, ke ĝi komprenu sin mem. En tio estas neniu propra motivo nek profito. Se ni plene konscias pri "kio estas", ni komprenas ĝin kaj do ni estas liberaj el ĝi, sed por konscii, ni devas ĉesigi nian strebadon por atingi ion, kio ni ne estas.

Idealto ne havas lokon en edukado, ĉar ĝi malhelpas kompreni la nunon : oni kapablas konscii pri "kio estas", nur kiam oni ne fuĝas en estontecon. Esti turnita al estonteco, strebi al iu idealo, tio montras spiritan malviglon kaj la deziron eviti la nunon.

Ĉu strebadi al artefarita utopio ne estas nei la individuajn liberon kaj integriĝon ? Kiam oni celas idealon, modelon, kiam oni havas formulon pri kio devus esti, ĉu oni ne havas supraĵan kaj automatan vivon ? Ni bezonas nek idealistojn nek mekanikspiritaĵojn, sed integritajn homojn, inteligentajn kaj liberajn. Voli ekapliki projekton pri perfekta socio, estas batali kaj elvershi sangon por "Kio devus esti", dum ni ne scias "Kio estas".

Se la homoj estus mekanikaj entoj, automataj, la estonta mondo estus antaŭvidebla kaj oni povus starigi planojn por perfekta utopio. Tiam ni povus zorgi el-pensi la kadrojn de estonta socio kaj nin direkti al alia efektivigo. Sed homoj ne estas mashinoj starigeblaj laŭ difinitaj konceptoj.

Inter nuno kaj estonteco estas vastega nekonataĵo, en kiu multaj influoj agas sur ĉiun el ni. Oferante la nunon al la estonteco, ni uzas erarajn rimedojn por celo, kiun ni imagas probable ĝusta. Sed la rimedoj determinas la celon ; kaj, cetere, kiuj ni estas por difini kio estu la homo ? Kio rajtigas nin decidi ĝian konformiĝon al ajna modelo, kiun priskribas tiu aŭ alia libro, aŭ kiun determinas niaj ambicioj, niaj esperoj kaj niaj timoj ?

Edukado, laŭ mia koncepto, apogas sin sur neniu ideologio, kiuj ajn estas ĝiaj promesoj pri estonta utopio ; ĝi apogas sin sur neniu sistemo, kiel ajn inteligenta, kaj ne devas esti rimedo por iel aŭ aliel kondiĉigi la individuon. Edukado devas helpi la individuon libere maturiĝi, disflori en amo kaj humano. Pri tio ni devus zorgi kaj ne modli la infanon konforme al ideala modelo.

Ĉiu metodo, kiu klasas infanojn laŭ ties karakteroj kaj kapabloj, nur reliefigas iliajn diferencojn kaj pro tio naskas antagonismojn kaj stimulas la sociajn disiĝojn. Ĝi do ne kontribuas disvolvi integritajn homojn. Evidentas, ke neniu metodo kaj neniu sistemo povas esti fundamento de la edukado pri kiu mi parolas. Ekapliko de metodo estas signo de spirita malviglo ĉe la edukanto. Tiel longe, dum edukado apogas sin sur nete difinitaj principoj, ĝi povas rezultigi nur tre lertajn geviojn, sed ne homojn kreivajn.

Nur amo povas naski komprenemon pri aliulo. Kie estas amo, tie estas tuja komuniĝo kun aliulo, samtempe kaj sur la sama nivelo. Ĉar ni estas mem tiel korsekaj, tiel vakuaj kaj sen amo, tial ni permesis al registaroj kaj sistemoj ekkapti la edukadon de niaj infanoj kaj la gvidadon de niaj vivoj ; sed la registaroj volas eficientajn teknikistojn, kaj ne homojn, ĉar vere homaj estuloj endanĝerigas la shtatojn kaj la organizitajn religiojn. Jen kial registaroj kaj Eklezioj provas kontroli edukadon.

Vivo ne lasas sin konformigi al sistemo ; ĝin oni ne povas enfermi en kadro, kiel ajn nobla, kaj spirito ekzercita nur al kono de faktoj, ne kapablas ektushi vivon kun ĉiuj ĝiaj diversaĵoj, subtilaĵoj, profundaĵoj kaj altaĵoj. Kiam ni instruas niajn infanojn laŭ penssistemo aŭ aplikante difinitan metodon, kiam ni instruas ilin pensi laŭ fakaj kredoj, tiam ni malhelpas al ili fariĝi integritaj homoj, kaj sekve ili ne kapablas pensi inteligente, do ektushi la vivon en ĝia unueco.

Sed la plej alta funkcio de edukado ĝuste estas krei integritajn individuojn, kapablajn konsideri la vivon en ĝia tuteco. Idealisto, tutsame kiel fakulo, zorgas ne pri la tuto sed nur pri parto. Ne

povas esti integriĝo, kiam oni strebas agi konforme al idealo. Kaj la plimulto el la edukistoj-idealistoj neglektis amon. Sekas iliaj spiritoj kaj koroj. Por studi infanon, la edukanto devas esti atenta, en observa stato, kaj samtempe esti klarvida pri sia propra procezo, kio postulas multe pli da amemo kaj inteligento ol instigi infanon sekvi idealon.

(Daurigota en OVo 79)

• **Ian Fantom** <ian@keeptalking.info>

Propono por Kongresa Rezolucio de la cent-unua Universala Kongreso de Esperanto en Nitro, 2016

Hodiaŭ matene - sabaton la 23an de julio 2016 - okazas la Inaŭguro de la 101a Universala Kongreso de Esperanto, en Nitra, Slovakio. Estas la tradicio en la Ferma kunsido la postan sabaton akcepti kongresan rezolucion celitan al la ekstera mondo. La suban tekston mi sendis al la estraro de Universala Esperanto-Asocio kun peto, ke ili tion konsideru por esti la kongresa rezolucio por tiu kongreso.

Antaŭ kvin tagoj emerita usona diplomato Paul Craig Roberts aŭdis artikolon 'Nice Brings to Mind Operation Gladio' [Nice pensigas pri Operacio Gladio] (<http://www.paulcraigroberts.org/2016/07/18/nice-brings-to-mind-operation-gladio/>). Sed kiel konsciigi la publikon pri tiu afero Gladio? La afero estis tiom ŝoka, ke la homoj malfacile enkapigas ĝin?

Tiucele mi kompilis la suban rezoluciproponon, bazitan sur rezolucio de la Eŭropa Parlamento, tutsimple petante al la Eŭropa Parlamento raporti pri la sekvoj de tiu rezolucio. Neniu pacama homo povus malkonsenti kun tio, kaj se la Eŭropa Parlamenta valoras iom ajn, ĝi devas demonstri, ke ĝi kapablas fari pli ol produkti belajn rezoluciojn.

Mi jam nun distribuas tiun tekston, en la espero, ke ĝi inspiros aliajn pripensi kiel eventuale aliri grupojn en kiuj ili mem membras, eble prezentante similajn rezoluciojn.

Mi jam aŭdis tiun tekston en Esperanto ĉe La Libera Folio (<http://www.liberafolio.org/Members/iafantomo/propono-por-kongresa-rezolucio-de-la-cent-unua-universala-kongreso-de-esperanto-en-nitro-2016>) - kiu nun atendas moderigon - kaj kolego Mark Windows aŭdis ĉi-vespere en sia retejo Window on the World (<http://windowsontheworld.net/>). Mi povas provizi al vi la formatitan tekston en Word for Windows aŭ PDF en Esperanto aŭ la angla.

Proponita al la Estraro de Universala Esperanto-Asocio de Ian Fantom, 2016-07-22

La cent-unua Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 23a ĝis la 30a de julio, 2016,

A. konscia pri forta deziro inter ordinaraj homoj por paca kunvivado de la diversaj gentoj de la mondo, kiu en 1887 rezultis en la estiĝo de Esperanto kaj la Esperanto-movado, kaj kiu daŭras ĝis hodiaŭ,

B. konsiderante la vortojn de la iniciatinto de Esperanto, d-ro L. L. Zamenhof, en sia festparolado de la sesa Universala Kongreso de Esperanto, post la malpacoj en Rusio de 1905 kaj 1906, "Oni scias nun tute klare, ke kulpas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj",

C. komprenante, ke tiuj "plej malnoblaj rimedoj" kreas malamon inter gentoj ĉefe distingeblaj per siaj diferencoj de lingvoj kaj religioj,

Ĉ. notinte la nuntempan kreskon de terorismaj eventoj en diversaj parto de la mondo,

D. konscia pri la rezolucio de la Eŭropa Parlamento pri la afero Gladio, akceptita la 22an de novembro 1990, pri la ekzisto de sekretaj militaj operacioj de iuj Membro-Ŝtatoj, implikitaj en seriozaj kazoj de terorismo, kaj kiu vokis al la registaroj de la Membro-Ŝtatoj malmunti ĉiujn kaŝajn militajn kaj kvazaŭmilitajn retojn, vokis al ĉiuj juĝistaroj de tiuj landoj plene prilumi ilian konsiston kaj funkcion, petis al tiuj Membro-Ŝtatoj kompili kompletan liston de organizaĵoj aktivaj sur tiu kampo, vokis al la Konsilio de Ministroj provizi plenajn informojn pri tiuj sekretaj spionaj kaj operaciaj servoj, kaj vokis al sia kompetenta komitato konsideri okazigi tribunalon por klarigi la rolon kaj efikecon de la organizaĵo 'Gladio' kaj iujn similajn organizaĵojn, kaj instruis al sia Prezidanto plusendi tiun rezolucion al la Komisiono, la Konsilio, la Sekretario Ĝenerala de NATO, la registaroj de la Membro-Ŝtatoj kaj la registaro de Usono,

1. vokas al la Eŭropa Parlamento kompili kaj publikigi raporton pri la sekvoj kaj konsekvencoj de sia rezolucio pri la afero Gladio, kiu inkluzivu la reagojn de la Eŭropa Komisiono, la Konsilio de Ministroj, la Sekretario Ĝenerala de NATO, la registaroj de la Membro-Ŝtatoj kaj la registaro de Usono, kaj eventualajn ĝisdatigojn kaj pruvojn pri la malmunto de la tiuj sekretaj terorismaj organizaĵoj, kaj eventualan rilaton kun la nuntempa terorismo en Eŭropo kaj aliloke.

Teksto de la rezolucio de la Eŭropa Parlamento pri la afero Gladio:

REZOLUCIO la afero Gladio

La Eŭropa Parlamento,

A. konstatante la malkaŝon fare de pluraj eŭropaj registaroj pri la ekzisto dum 40 jaroj de la kaŝa paralela organiziĝo en pluraj membro-ŝtatoj de la Komunumo de spionaj kaj armitaj operacioj,

B. konsiderante, ke dum pli ol 40 jaroj tiu organiziĝo eskapis ĉiujn demokratiajn kontrolojn, kaj estis gvidata de la sekretaj servoj de la koncernaj ŝtatoj kunlabore kun NATO,

C. timante la danĝeron, ke tia kaŝa reto povus esti kontraŭleĝe interveninta en la internaj politikaj aferojn de la Membro-Ŝtatoj aŭ eble ankoraŭ faras,

D. konsiderante ke en iuj Membro-Ŝtatoj sekretaj militservoj (aŭ neregataj branĉoj de tiuj) estis implikitaj en seriozaj kazoj de terorismo kaj krimo, kiel atestis diversaj juraj enketoj,

E. konsiderante, ke tiuj organizaĵoj funkciis kaj funkciadas entute ekstere de la juro, en tio ke ili ne estas sub rego de ajna parlamenta kontrolo, kaj ofte tiuj kiuj okupas la plej altajn postenojn registarajn kaj konstituciajn estas tenataj en la mallumo rilate al tiuj aferoj,

F. konsiderante, ke la diversaj organizaĵoj 'Gladio' disponas pri sendependaj armilaroj kaj militservaj rimedoj, kiuj donas al ili nekonatan eventualan atakpovon, tiel endanĝerigante la demokratiajn strukturojn de la landoj en kiuj ili operacias aŭ operaciis,

G. estante ege ĉagrenigitaj pro la ekzisto de decidofaraj kaj operaciaj organizaĵoj kiuj ne estas respondecaj al ajna formo de demokratia rego, kaj kiuj estas entute kaŝaj laŭ sia naturo en tempo kiam pli granda kunlaboro en la Komunumo sur la kampo de sekureco estas konstanta diskuttemo,

1. Kondamnas la kaŝan kreon de manipulaĵoj kaj operaciaj retoj, kaj vokas por plena esploro pri la esenco, la strukturo, la celoj kaj ĉiuj aliaj aspektoj de tiuj kaŝaj organizaĵoj aŭ iuj ajn frakcioj, ilia uzo por kontraŭleĝa interveno en la internaj politikaj aferoj de la rilataj landoj, la problemoj de terorismo en Eŭropo kaj la eventuala koluziado de la sekretaj servoj de Membro-Ŝtatoj aŭ eksteraj landoj;

2. Protestas energie pro la supozo fare de iuj usonaj militservaj personoj ĉe SHAPE kaj en NATO pri la rajto kuraĝigi la establiĝon en Eŭropo de kaŝa spionserva kaj operacia reto;

3. Vokas al la registaroj de la Membro-Ŝtatoj malmunti ĉiujn kaŝajn militajn kaj kvazaŭmilitajn retojn;

4. Vokas al ĉiuj juĝistaroj de la landoj en kiuj estis konstatita la ĉeesto de tiaj militaj organizaĵoj, por plene prilumi ilian konsiston kaj funkcionmanieron, kaj por klarigi iun ajn agadon kiun ili eventuale faris por malstabiligi la demokratian strukturon de la Membro-Ŝtatoj;
5. Petas al ĉiuj Membro-Ŝtatoj uzi ĉiujn necesajn rimedojn, se necese per establo de parlamentaj enket-komitatoj por kompili kompletan liston de organizaĵoj aktivaj sur tiu kampo, kaj samtempe por kontroli iliajn ligojn kun la respektivaj ŝtataj spionservoj kaj ligitaj organizaĵoj, kaj eventuale kun teroristaj ag-grupoj kaj/aŭ aliaj kontraŭleĝaj praktikoj;
6. Vokas al la Konsilio de Ministroj provizi plenajn informojn pri la aktivecoj de tiuj sekretaj spionaj kaj operaciaj servoj;
7. Vokas al sia kompetenta komitato konsideri okazigi tribunalon por klarigi la rolon kaj efikecon de la organizaĵo 'Gladio' kaj iuj ajn similaj organizaĵoj;
8. Instruacias al sia Prezidanto plusendi tiun ĉi rezolucion al la Komisiono, la Konsilio, la Sekretario Ĝenerala de NATO, la registaroj de la Membro-Ŝtatoj kaj la registaro de Usono.

Referencoj:

1. La Universalajn Kongresojn de Esperanto organizas Universala Esperanto-Asocio, kunlabore kun lokaj organiz-grupoj. Detalojn por la Kongreso de 2016 en Nitra, Slovakio, oni povas trovi en ilia retejo (<http://www.nitra2016.sk>). Informojn pri iliaj vivaj interretaj elsendoj donas la ĉefpaĝo, kaj priskribon en la angla donas iliaj anglalingvaj paĝoj (<http://www.nitra2016.sk/en>).
2. 'Resolution on the Gladio affair: Joint resolution replacing B3-2021, 2058, 2068, 2078 and 2087/90'. In: 'MINUTES OF PROCEEDINGS OF THE SITTING OF THURSDAY, 22 NOVEMBER 1990', Official Journal of the European Communities, 90/C 324/04, 1990-12-24, pages No C 324/201 - No C 324/202 (http://eur-lex.europa.eu/legal-content/EN/TXT/?uri=uriserv:OJ.C_.1990.324.01.0186.01.ENG) ['Rezolucio pri la afero Gladio: Komuna rezolucio astataŭiganta B3-2021, 2058, 2068, 2078 kaj 2087/90'. En: Protokolo de la traktado de kusido de jaŭdo, la 22an de novembro 1990', Oficiala gazeto de la Eŭropaj Komunumoj, 90/C 324/04, 1990-12-24, pages No C 324/201 - No C 324/202 (http://eur-lex.europa.eu/legal-content/EN/TXT/?uri=uriserv:OJ.C_.1990.324.01.0186.01.ENG)]
3. 'Gladio', BBC 2 (televizkanalo), Serio de tri programeroj en la serio de BBC2 'Timewatĉ', Direktoro Allan Francoviĉ, 1992-06-10, Parto 1: Gladio: La Ring-estroj; 1992-06-17 Parto 2: Gladio: La Pupistoj; Parto 3: Gladio: La Piedsoldatoj (http://motionempire.com/Watĉ_Gladio_Documentary_Online_for_Free_37954.html). Ankaŭ reproduktitaj kiel aparta filmo en la retejo 'Operacio Gladio', kiu ankaŭ kontrolas rilatajn aktualajn aferojn (<http://operation-gladio.net/operation-gladio-bbc-timewatĉ-1992>). Tuta daŭro: 2:25:44.
4. 'NATO's Secret Armies: Operation GLADIO and terrorism in Western Europe' [La sekretaj aremoj de NATO: Operacio GLADIO kaj terorismo en Okcidenta Eŭropo], Daniele Ganser, Routledge, unua eldono (2004-12-22), ISBN-10: [0714685003](https://www.danieleganser.ch/monografien.html), ISBN-13: [978-0714685007](https://www.danieleganser.ch/monografien.html), 336 paĝoj. Dua eldono: 'Nato's Secret Armies: Operation Gladio and Terrorism in Western Europe' [La sekretaj armeoj de NATO: Operacio Gladio kaj terorismo en Okcidenta Eŭropo], Daniele Ganser, 2005, Frank Cass Verlag London, 315 pages, ISBN: 0714685003. Germana eldono: 'NATO-Geheimarmeen in Europa: Inszenierter Terror und verdeckte Kriegsführung', Orell Füssli, Zŭriĉ, 2008, 446 paĝoj, ISBN 978-3-280-06106-0. Ankaŭ en aliaj lingvoj (<https://www.danieleganser.ch/monografien.html>).
5. 'Gladio, Nato's Dagger at the Heart of Europe: The Pentagon-Nazi-Mafia Terror Axis' [Gladio, la ponardo de NATO ĉe la koro de Eŭropo: La Pentagon-Nazi-Mafia teror-akso], Riĉard Cottrell, Progressive Press, Eldono 1: 2012-05-09, 484 paĝoj, ASIN: B00DJFONZQ; Eldono 1.1: 2015-06-23, 498 paĝoj, ISBN-10: [1615776885](http://www.progressivepress.com/book-listing/gladio-natos-dagger-heart-europe) (<http://www.progressivepress.com/book-listing/gladio-natos-dagger-heart-europe>).

Kompilis Ian Fantom, Brentwood, 44 Kell Lane, Stump Cross, Halifax, H3 7AY, tel [+44\(0\)1422 352153](tel:+44(0)1422352153), poŝtel: [+44\(0\)17530 142609](tel:+44(0)17530142609) retroŝto: ian@fantom.org.uk

Restu parolantaj!

Kore salutas Ian

Dankon kara, mi konsentas je tio. Mi apewrigos vian proponon sur nia Bulteno, amike Bardhyl

Rimarko de Andy Kuenzli

Ĉi tiu kontribuajo estas neeltenebla kaj neakceptebla kaj klare montras la politikan simpation de la redaktoro de la koncerna retforumo, kiu allasis ĝian publikigon.

•

EU-Referendumo: Ĉu ĝi estis justa? Keep Talking: mardon 2016-07-05

Estis multe da diskutado dum la brita EU-Referenduma kampanjo pri kiel la potenculoj atingos, ke la donos finfine la ĝustan rezulton. Ĉu estos falsado de la voĉdonoj? Ĉu la registaro vere prenos Brition ekster la EU-on se la homoj voĉdonos por Brexit? Kiel estus voĉdono por Brexit esti 'mastrumita' - por uzi la esprimon de Angela Merkel rilate al la nederlanda EU-Referendumo pri eventuala eniro de Ukrainio? Iuj scivolis, ĉu estos iaspeca incidento, kiel falsflaga terorista evento, kiu pelos la voĉdonantojn en la direkton de 'Restu'.

La 16an de junio la tendenco al Brexit subite inversiĝis, sekve de raportoj pri la murdo de parlamentano Jo Cox. Kio vere okazis? Ĉu la sekva propagando estis orkestrumita? Kiom da diferenco tio faris? La murdo de parlamentano, por inversigi la tendencon, estis efektive antaŭvidita de François Asselineau en Radio Sputnik per komparo kun la sveda referendumo pri la Eŭro. Pri tio mi skribis en mia plej lasta Aktualajraporto de Keep Talking - en la plej lasta sekcio. Ni konceptis tiun temon por nia julia kunveno de Keep Talking frue en la kampanjo, dum la homoj ekhavis dubojn. Estis neeble trovi parolantojn en tiu stadio, ĉar ĉiuj kiuj estis enplektitaj en la referenduma kampanjo estis tro okupataj por tion pripensi. Sed nun la tuto kuniĝas. Nick Kollerstrom konsentis resumi la propagandon post la raportita murdo de Jo Cox, kaj Patrick Griffin el Kalifornio atendas esti en Londono por tiu kunveno, kaj li konsentis trairi la eventojn de Orlando, montrante eventualajn komparojn kun la rakonto pri Jo Cox. Pasintmonate Nick paroladis pri la evento en Bataclan, sub la titolo 'Teroro ĉe la koro de EU'. Ĉiuj tri evgentoj evidentiĝis signojn de falsado.

Se iu kontrolis la referendum mem, aŭ havas aliajn informojn, ni do bonvenigus raporton antaŭ de ŝi-li.

Kutime mi sendas tiujn ĉi avizojn al la homoj en atingodistanco de Londono. Foje mi erare sendis ilin al mia internacia listo, kaj ricevis iujn interesajn reagojn, inkluzive de pardonpetoj pro neĉeesto lokoj dise en la mondo. Mi pensis, ke mi faru same por tiu ĉi kunveno, ĉar ne temas nur pri kunveno; estas en si mem novaĵo. Ni estos sub proksima observado, kaj mi deziras, ke homoj konsciu pri tio antaŭ la evento. Estis seriozaj provoj saboti la librolanĉon de 'Terror on the Tube' [Teroro en la Subtero] de Nick, pri kio mi detale raportis en mia tiutempa novaĵletero. Sed ni devas daŭrigi la paroladon.

• Ŝanĝiĝas la imaĝo de Turkio

Ĉu nur la imaĝo? Tute ne! Ŝanĝiĝas mem la sistemo politika heredigita de historia gvidanto Kemal Ataturk. Ekde la unuaj jaroj post 2000, kiam s-ro Erdoan eniris la grandan politikon en sia lando, la homoj konstatis ian distantiĝon disde la laikaj kaj sekularecaj valoroj de la moderna Turkio. Mia fratino laboris tiam en Istanbul kaj sentis tion. Sed ankaŭ pluraj miaj konatoj kaj kuzoj, loĝantaj en la plej granda balkana lando, aspiranta eniri EU. Mia amiko el Sarajevo, s-ro Smajl Grbo, postis en la Vizaĝlibron, lastajn tagojn, la sekvan foton, kiu "parolas" pli multe ol mil vortoj.

Türkiye-1967



Türkiye-2014



Laŭ profesoro de la universitato "Wisdom" de Tirana, s-ro Laurant Bicaĵ, estas ja milionoj da albanoj fuĝintaj tien dum la lastaj du jarcentoj, komencante de la jaro 1878, kiam centmiloj el ili estis devigitaj forlasi siajn terojn en suda Serbio pro Traktato de Sankta Stefano kaj Berlino, poste en la jaroj 1912, 1918, jaroj 1930, 1956, dum la ekzisto de la eksa Reĝeca Jugoslavio. Ke albanoj fariĝis ankaŭ politika faktoro, tion montras ankaŭ la lasta "ŝtata puĉo", kie partoprenis sufiĉe multe da altranrangaj oficiroj albanadevenaj. Sed, plejverŝajne la "puĉo" estis incitita aŭ aranĝita de mem reĝimo de Erdoan.

Certe la okazintaĵoj en Turkio efikos ankaŭ al Albanio mem. Turkio estas investinta multon ankaŭ en ĝi, sur la kampoj de konstruado, telekomunikado, bankoj, edukado, bonfarado, komerco, ne menciante la religion, t.e. la starigon de centoj da novaj moskeoj kaj lernejoj. Ankaŭ en Kosovo kaj Makedonio. Lastaj eventoj en ĝi, iel disigis ankaŭ albanojn kiuj favoras kaj malfavoras la politikon de s-ro Erdoan kaj de sia opozicio, gvidata de s-ro Gulen. Ne certas kian sintenon havas mem la politikistoj, kiuj, nunpurnun, estas tre okupitaj per enlandaj problemoj gravaj, precipe rilate la reformon en la justeco.

Dume, ĉiuj ni, ordinaraj civitanoj, kondukas maltrankvile la eventojn aktualajn en tiu NATO-a membro-ŝtato, kie oni arestas, turmentas, mortigas, eĉ senkapigas militistojn, maldungas 3000 juĝistojn, 50 mil oficistojn kaj, kiu scias, kio okazos alie dum la venontaj 3 monatoj de la eksterordinara stato, proklamita de registaro. La vidaĵoj de placoj plenplenaj je civitanoj "fidelaj" al la reĝimo rememorigas min la placojn de Albanio dum 46 jaroj da komunisma reĝimo, kiam la ununura politika partio-ŝtato devigis la homojn ariĝi kaj aplaŭdi sian gvidanton neerarigeblan.

Dio savu la demokration en Turkio!

Bardhyl Selimi, 21an de julio 2016

- **Homa maŝino kaj oleo de sento**

Ĉi tie oni studas.

Oni formas Cerbon kaj Koron.

Penso de Paiva Netto, el la jardeko post 1970, montrata ĉe lernejoj de LBV en Brazilo kaj eksterlande, ekde la inaŭguro de Infanvartejo Jesuo, en San-Paŭlo/SP, je la 25-a de januaro

1986. Edukado estas ĉiam aktuala temo. Urĝas, ke ni ĉiuj disvastigu kaj alfrontu ĝin, kiel sekuran vojon, kiu mallongigas la socian distancon inter klasoj. Ĝi estas ankaŭ efika rimedo kontraŭ perforto, krimado, malsanoj kaj ĉio ajn, kio nuligas sanan kreskadon de popolo.

Responde al peto de amikoj, jen mi ĉi tie prezentas pecojn de prelego, kiun mi faris je la 9-a de marto 2010, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, kun partopreno per interreto de pluraj lokoj en Brazilo kaj eksterlande. Inter la traktitaj temoj, troviĝis la Pedagogio de Dio, kiun rekomendis **Alziro Zarur** (1914-1979), kiun poste ni elvolvis al socieduka tezo de Legio de Bona Volo, celanta kunigi la kognan evoluadon de lernanto al kulturo de plurobla respekto; tial, ĉiam kun Ekumena Spiritualeco, kaj pri tio mi al Vi parolas ofte. De tio rezultis responde Pedagogio de Amo kaj tiu de Ekumena Civitano, por gejunuloj kaj plenkreskuloj.

Improvize, mi parolis pri tiu temo, dirante, ke ne sufiĉas kleriĝi pri raciaj homaj aferoj. Laŭ tio, kion mi emfazis en februaro 1984, kiam mi parolis al virinoj okupitaj pri agadoj de LBV, kaj poste per ĵurnalo Folha de S.Paulo, je la 27-a de julio 1986: Instruado, laŭ ni, estas tiu ricevata ĉe lernejo, ĉe kolegio, ĉe universitato aŭ ie ajn, kiun oni devas ligi al la hejmo, en formo de Edukado. Tia ligo estas nepre necesa. Sen Instruado kaj Edukado ne eblas progreso. Sed instrui kaj eduki ne signifas nur instrui legadon, plongon en librojn. Super ĉio, temas pri prilumado de inteligenteco por harmoniaj funkcioj de la Homo en socio. Cetere, socio kaj registaro devas konstante unuiĝi por starigi strukturon, kiu efektive formu ian pli bonan patrolandon, ian pli feliĉan mondon. Ju pli malbona la instruado, des pli malbona la estonteco. Do, instrui ne signifas nur transdoni abocon de surtera scienco, eĉ se plej altan Matematikon, Fizikon, Ĥemion, Astronomion, k.t.p.. Ĉar se ne troviĝas bona nutraĵo por la Animo — prilumata per spiritualigo, kiu signifas pli ol eduki, sed reeduki —, tiam tia radikalinstrua lernado kondukos la Homon, sen tia bona nutraĵo, al pensoj kaj agoj pli kaj pli detruaj. Eduki signifas transformi, reeduki, sub aŭspicioj de Paco, de Amo kaj de Justeco, vivigata per Bonkoreco kaj sekve ĝi signifas sublimigon de homa karaktero.

Sen Instruado, kaj precipe sen Edukado ne eblas morgaŭo. Ĉu vi memoras Planon Marshall, por Eŭropo, pri kiu mi jam parolis al vi plurfoje? Oni elstarigu Germanujon, en Okcidento, kaj Japanujon, en Azio, kun **MacArthur** (1880-1964), kiuj vigle releviĝis. Tamen, la produktado de tiuj du landoj, kaj ankaŭ de multaj aliaj, bankrotus dum tiu periodo kaj dum iu ajn alia periodo, se oni ne preparus generacion, por kiu klerigado estis profunda, taŭga kiel fundamento al postaj generacioj.

Amo kaj Respekto

Oni multe plendas pri perforto ĉe lernejoj, sed se lernanto tien venas por lerni plivastigi sian rezonkapablon por fariĝi kapabla ensorbi la bezonatajn lecionojn laŭ teknika sciakiro, paralele oni devas nepre konsideri plej taŭgan zorgon pri sentoj.

Por infanoj, amo, kaj por junuloj, respekto similas funkciantan maŝinon: unuflanke la dentradoj, nome la menso, la logiko; aliflanke, la Animo, la sentemo, kiu evitas, ke ni fariĝu ĉiam pli sovaĝaj! Nu, la radodentoj sinsekve renkontiĝas kaj movas la maŝinon. Tamen, se Vi ne aldonas al tiu sistemo oleon de Frateco, de Solidareco, de Mizerikordo, de Kompatemo, ĉio paneas, blokiĝas, rustiĝas kaj fiaskas!

Precipa tasko

Ĉu Vi iam vidis bone funkciantan maŝinon, se ĝi ne estas taŭge oleita? Kio estas Homaro? Ĝi estas ia eksterordinara aparato, kiun oni devas olei per sento, kiu venas de Dio, se oni komprenas Lin kiel Amon, do Kariton. Kaj ĉu vi scias, kiuj estas ĝiaj dentradoj? Ni mem!, kiuj ne estas iaj rustiĝemaj metalpecoj, krom se ni infektiĝis de senmoviganta nenifrado.

Jen estas nia precipa tasko: kleriĝi, edukiĝi, reedukiĝi, por efike instrui, eduki, reeduki. Nome, trafa Edukado liberigas. Kaj kun Ekumena Spiritualeco, ĝi sublimigas.

Vidu trans intelekto

En intervjuo, kiun mi donis al veterana itala ĵurnalisto, de longe loĝanta en Brazilo, Paulo Rappoccio Parisi, je la 10-a de oktobro 1981, mi diris, ke ĉe Legio de Bona Volo ni bataladas por Edukado kaj Klerigado ligitaj al lumiganta agado de Ekumena Spiritualeco. Cetere, por sublime kunigi lumojn de intelekto kaj Sunon de Spirita Kono, LBV pionire antaŭeniras por venigi en lernoĉambrojn – pro tio ni solidigas Pedagogion de Ekumena Civitano, aŭ Solidara Civitano, kaj Pedagogion de Bonaj Sentoj, de Amo (por infanoj ĉe infanvartejoj de LBV), ĉe ĝiaj instruorganoj – kapabligon pri etika komprenpovo, cele al la Eterna Vivo, kaj same grave: apliki tion al konkretaj defioj de surtera vivo. Kiel ĉe kartezia geometrio, necesas, ke materia Edukado (ikso-koordinato aŭ koordinato de abscisoj) renkontu scion venintan el plej altaj sferoj de Dia Saĝo, nome el Amo (ipsilono-koordinato, aŭ koordinato de ordinatoj). Saĝulo komprenas kaj uzas inteligenton, intelekton, teknikan aŭ specifan konon profite al Homoj. Tamen, ekzistas tiom da tre inteligentaj homoj, kiuj fiagadas en ĉi tiu mondo. Ĉu estas saĝa tiu, kiu damaĝas sian similulon? Ne! Ni do akiru Saĝecon kun Jesuo, kiu estis Majstro en Israelo, kaj post centoj da jaroj unu el la plej respektataj profetoj en Islamo, lavis la piedojn de Siaj fratoj, laŭ raporto de Johano, en la 13-a ĉapitro de la kvara kanonika Evangelio. Salomono, en Sentencoj, 16:16, skribis: "Akiro de saĝeco estas multe pli bona ol oro; kaj akiro de distingkapablo preferinda ol arĝento."

Tiam ni iros laŭ ĝusta vojo, por prilumi la Spiriton per Lumo, kiu ne estigas ombrojn: lumo de Dio, se oni komprenas Lin kiel Amon, mi ripetas, neniam homforme, kion nepre kontraŭstaris Albert Einstein (1879-1955). Aŭ, por tiuj, kiuj ne kredas Lin, la lumo de noblaj sentoj, kiuj pravigas postvivadon de la homa raso, malgraŭ multaj jarcentoj da frenezo flanke de homoj, kiuj, larĝasence regis ĝin, ĉar ne nur loĝantoj en palacoj faras tion. (...) Ĉe la enirejo de Instituto pri Edukado de LBV, en la urbo San-Paŭlo, kaj ĉe ĝiaj lernejoj de LBV en Brazilo kaj eksterlande, oni legas klare: **Ĉi tie oni studas. Oni formas Cerbon kaj Koron.** Unu bezonas la alian.

Skribis Emmanuel, en ĉapitro "Infanoj", en sia verko Vivanta Fonto, psikografie skribita de Francisco Cândido Xavier (1910-2002), inspirite de la versiklo 10-a de la Evangelio de Jesuo, laŭ Mateo, ĉapitro 18-a: "Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj...":

"Infanoj

Emmanuel

"Kiam Jesuo rekomendis al ni, ke ni ne malestimu la malgrandulojn, Li celis, ke ni zorgu ne nur pri pano kaj vesto.

"Ne sufiĉas nutri etajn malsatantajn buŝojn aŭ vesti frostiĝintajn korpetojn. Nepre necesas morala ŝirmado, kiu garantiu al renaskiĝanta spirito taŭgan etoson por ties sublimado.

"Multaj gepatroj liveras materian komforton al siaj gefiloj, sed bedaŭrinde forlasas ilian animon.

"(...)

"Ne forlasu do infanon, fordonante ĝin al impulsoj de besteca naturo.

"(...)"Telero da manĝaĵo estas grava por elvolviĝado de homo, sed oni ne rajtas forgesi, ke 'ne nur per pano la homo vivas'.

"Ni memoru pri nutrado de infanoj per niaj agoj kaj ekzemploj, admonoj kaj alĝustigoj, en oportuna tempo, ĉar morala neapogado de infano, je nuntempaj taskoj, estus kondamni ĝin al memmalestimo rilate ĝian estontan agadon."

Koncerne tion, per dokumento, kiun ni sendis al UN, okaze de Konferenco pri Statuso de

Virinoj, en marto 2009, mi asertis denove, ke stabileco en la mondo komenciĝas ĉe infana koro. Pro tio, en LBV, de multaj jaroj, ni uzas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano. (...) La amo, kiu inspiras nian pedagogian vojon, se oni prenas ĝin laŭ plej alta senco, estas ne nur alta sento de Animo, sed **politika strategio**, same komprenata kiel plej alta inklino, konforme al Socia Justeco, kiel **iastrategio por postvivado** por individuoj, popoloj, nacioj. Homoj – do civitanoj, interalie esperplenaj gejunuloj – estas multe pli ol sako da karno, ostoj, muskoloj, nervoj, sango. Ili amas kaj suferas. Ili revas, deziras, konstruas, elreviĝas, kaj malgraŭ ĉio ili plu iradas, ili antaŭeniradas... Ili meritas, krom leĝoj, respekton, tiel ke leĝoj neniam konsistigu obskurajn privilegiojn, sed estu plenumataj favore al ĉiuj (...).

José de Paiva Netto

Eo Espero

• **LA SORĈA RENKONTIĜO KUN HALINA KUROPATNICKA-SALAMON**

La **16-an de julio 2016** en la Klubo de Muziko kaj Literaturo okazis originala renkontiĝo kun la fama vrocłava poetino kaj esperantistino **Halina Kuropatnicka-Salamon**. La renkontiĝon preparis por esperantistoj kaj neesperantistoj la Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo (E-organizaĵo) kune kun la Klubo de Muziko kaj Literaturo (ne-E-organizaĵo).

Ĉifoje vrocłava publiko havis eblecon partopreni en escepta kaj tre interesa renkontiĝo, kiu estis titolita: „**En lumo de la verda steleto**”. Halina Kuropatnicka-Salamon ne nur deklamis proprajn versaĵojn, sed ankaŭ legis fragmentojn de siaj rakontoj, kiuj grandparte estis biografio de la aŭtorino. Ŝi laŭ ekzemploj de sia vivio invitis la publikon por viziti belajn lokojn de sia infaneco, junaĝo kaj plenaĝeco belege enplektante informojn pri Esperanto kaj profitoj, kiujn donas ekkonon de Esperanto.

De tempo al tempo la publiko laŭte esprimis siajn sentojn komentante ekaŭditan tekston. Dank' al tio kreiĝis belega kaj eksterordinara etoso.

La Esperanta kaj ĉefe neesperanta publiko estis ravitaj kaj **ne avaris aplaŭdojn kaj belajn dankovortojn**. Grandan surprizon faris la aŭtorino subskribante per brajlo dediĉon en poeziaj volumetoj.

La komuna foto finis renkontiĝon, kiu **montris belmaniere valoron kaj uzeblecon de Esperanto**.

Nome de la estraro de la Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo

Małgosia Komarnicka



- **Fermitaj Prizonoj**

Intelekta edukado ne sufiĉas por formi la veran civitanon de la tria jarmilo, kiu havas... mil jarojn por elvolvi ian novan specon de civilizo. Al la cerbo aliĝu bona sento.

Arquivo LBV



Victor Hugo

Timo naskiĝas de nescio. Pro tio, kiu malfermas lernejojn kaj spiritigas la scion, tiu prilumas la Animojn kaj fermas prizonojn. **Victor Hugo** (1802-1885) diris, ke — kiu malfermas lernejojn, tiu fermas karcerojn. Urĝas diskonigi la Pedagogion de Ekumena Civitano, la Pedagogion de Amo, de Karesemo kaj de Estimo, nemalhaveblaj por la subtenado de la Spirito, energiaj medikamentoj por la kuracado de malsanoj, unualoke de la psikaj, kiuj malhelpas la ensorbado de instruoj necesaj por la intelekta pliriĉigado de lernantoj. La bona gusto de la vivo estas senfina lernado.

Liberigita popolo

Edukita popolo estas liberigita popolo. Estas nepre necese al la progreso, ke popolaj amasoj pli kaj pli lernadu, edukiĝadu kaj spiritiĝadu, ĉar sen frateco kaj respekto ne eblos paca socio. Sekve, per eniro en dignan, pli feliĉan vivon, materie kaj morale.



Alziro Zarur

Malcom X (1925-1965), islama kaj granda negra gvidanto en Usono, superinte la ĉagrenojn de sia suferplena vojo, diris: *“La solaj homoj, kiuj efektive ŝanĝis la historion estis tiuj, kiuj ŝanĝis la pensmanieron de la homoj pri ili mem”*. **Alziro Zarur** (1914-1979) asertis, ke *“regi estas instrui al ĉiu homo regi sin mem”*. Kaj ne ekzistas alia vojo, krom tiu de Edukado kun Ekumena Spiritualeco, se ni ne forgesas, ke bona sano, korpe kaj mense, estas esence grava por la havigo de bona laboro.

Nenifarado kaj tombo Mi kutimas diri, ke la panpeceto hodiaŭa estas abunda manĝo por morgaŭ. Sekve, ni ne malŝparu ankaŭ tempon, kapablon, talenton kaj inteligentecon pro la sofismo de pigreco. La stoika filozofino **Seneko** (4 a.K. – 65 p.K.), kiu naskiĝis en Hispanujo kaj havis la malfeliĉan destinton fariĝi edukanto de **Nerono** (37 – 68 p.K.), protestis kontraŭ mokantoj, dirante: *“Nenifarado sen studado similas la morton kaj tombon por vivanta homo”*. Efektive, ĉiu troa facileco estas vojo al pli proksima tombo, ĉu korpe, ĉu morale.

Edukado ekzistas por liberigi la homon. Tamen, kun la nemalhavebla Spiritualeco, ĝi sublimigas lin. Jen ĉi tio estas la Pedagogio de Dio, kiu preparas la homon por travivi la ekumenan civitanecon, tutmondan, surbaze de plena praktikado de Solidareco.

José de Paiva Netto

Beletraĵoj

- Poezio

Skribis [Siranuish Slagmulder](#),
30/05/2016

Florinta Feliĉ'

Miloj da bel'floroj mi plantis
Apud la pordego de vilaĝ',
Somoran Sunon mi invitis
Por ke ĝi agnosku mon aĝe.

Miloj da gabbianoj ekflugis
Kun granda ĝojo de la mar',
Kaj ĝiaj kant'voĉoj mi aŭdis
Atinginte min sur bela ĉar.

La «Best' de Dio» min akceptis
Kun rideto sur ĝia karapac',
La radioj sur visaĝe respogulis
Kaj en mia koro alvenis la pac'.

Mi sentis min denove renaskita
Ĉio brilis sur influo de ĉarma tag'
Miaj miloj da floroj plantite
Floris promesinte la bel'vivan flag'.

• AL ĈIUJ TUTMONDAJ VIRINOJ

Nu, ho mia patrino!
Vi meritas gravan respekton,
Vi meritas multan konsideron, ĉar sen vi la mondo ne havas senson.
En tiu ĉi tago mardo, la 8-a de marto 2016, Ni bondeziras al vi bonan festotagon!

Kiam mi ekvidas mian patrinnon,
Komprenas mi, ke sen ŝi mi ne ekzistus.

Kiam mi vidas mian belan edzinon,
Komprenas mi la veran rolon de la virino.

Ni garantias al vi la sekurecon kaj protekton.

Ni defendos senĉese viajn rajtojn.
Ni aktivos por la egaleco de seksoj kaj kondamnos lautvoĉe la seksperforton
kontraŭ la virinoj.

Bonan festetosan tagon pro tutmonda virintago!
Amike via kunlaboranto Honoré Sebuĥoro.

Sebuĥoro, Madzella

1- MALJUNULINO EN TRAMO

Vera anekdoto okazinta en Murambi, nia kvartalo . En la tramo videblas multaj gemaljunuloj, ĉar ili ne plu havas automobilon kaj marŝas malfacile. Iam, maljuna virino entramiĝas por iri al la placo Katemba, portante dikan sakon, kiu pendas sur ŝia ŝultro. Ŝi havas mienon malgajan, vere malgajan. Iu ŝtelisto observas ŝin kaj alproksimiĝas iom post iom. Kaj kiam la tramo haltas, li ekkaptas la sakon de la sinjorino, elsaltas el la tramo kaj forkuras. Neniu povas lin kapti : li kuras tro rapide. La vojaĝantoj sin turnas al la majunulino por konsoli ŝin. Sed, ... ŝi ekridegas, ŝi ridas kaj ridadas ! Ŝi ne povas ĉesigi la ridadon ! La homoj kredas, ke temas pri nervo-krizo. Sed ne, nenio grava. Ne estas nervo-krizo ! Kelkajn minutojn poste, la sinjorino kvietiĝas kaj klarigas : " Vi ne komprenas ! Mi estis iranta al mia ĝardeno kaj en mia sako, estis mia mortinta ŝafo. Estas tie, kie mi estas enterigonta ĝin. Kompatinda besto"

Verkis S-ro Honore Sebuĥoro Prezidanto de Verda Stelano-Klubo Po Box 08 Bunagana-Kisoro
Ugando Rete:verdaamikaro@gmail.com;honsebn@gmail.com

2- KONFUZO

Drinkulo aldiris sian edzinon:

- De nun, ne plu fermu la pordon de la domo. Tiel, kiam mi revenos hejmen, mi povos manĝi

ĉetable sen vin ĝeni.

- Ha, karega, vi estas edzo mia. Estas vi kiu ordonas. Mi faros kion vi volos.

La edzino obeis kaj lasis la pordon malfermita. Ĉiunokte alvenis ebrie la edzo.

Sed unu nokton, alia drinkemulo kiu tro drinkis alkoholon venis, eniris. En la mallumo, tre laca, li pensis, ke li loĝas tie. Li do rapidiris ĝis la ĉambro kaj falis peze sur la liton apud la edzino de la aliulo. Shi, shi ne sciis kio okazis ĉar shi profunde dormis.

Pasis la tempo. Je la dua horo, alvenis la edzo. Tiun nokton, li kurioze reiris hejmen sen drinki eĉ unu solan guton de alkoholo. Malsata, li manĝis la pladon preparitan de sia edzo. Li kredis esti la nura viro en la hejmo, metafore la sola koko en la kokinejo. Post la manĝado, li lavis siajn manojn, vishis ilin. Li samtempe ruktis kaj furzis. Poste, li eniris ankau la ĉambron. Hej, li subite malkovris iun dormantan kaj ronkantan en la lito apud lia kunulino.

Li sin demandis : " Mi tamen ne drinkis. Kiu estas do tiu homo ? Ne estas mi mem kiun mi vidas. Ĉu mi sonĝas ? " Tute konfuzita, li pinĉis sian dekstran vangon, ĉar li pensis, ke lia cerbo vidigas al li falsajn figurojn. Tial li seke vekis la edzinon : " Maria ! Maria ! Vekiĝu ! Kion vi faras kun tiu viraĉo ? " Bolis lia sango. Li kokokriis kolere : " Vi nun venis ĉe mi kun via amanto ! De kiam vi ekigis tiun aĉan aferon ? Respondu tuj ! Kaj vi, kion vi faras en mia lito kun shi ? " - "Sed... mi ne komprenas... kiel... mi... ripozas... ĉi tie..." Fakte, nenio okazis inter la du dormuloj. Rompiĝis la geduo.

Jen estas la konsekvenco je la troo da alkoholo.

Madzella

Sigmond Julia

• PAPAĴETOJ KAJ LAVENDOJ

Ĉi tiuj estimataj italaj landvoj-ordigistoj rememorigis min malnovan kanton: "lekaszàltàk màr a rètet, s nem hagyta rajt' viràgot" = oni falĉis la herbokampojn, ne lasis vive eĉ unu floron.

Subite ili ekaperis, stirante falĉmaŝinegojn kaj ambaŭrande de la stratego falĉis la herbaĉojn, kiuj verdire jam altekreskis, sed tiam malaperis ankaŭ la belegaj papavetoj.

Mi tristiĝis.

Sed post tre mallonga tempo, mi rimarkis, ke aperis novaj papavetoj! Ekzemplodona estis tiu konduto de ĉi ruĝaj floretoj! Kvazaŭ ili estus dirintaj: "Aĉuloj! Ni ne lasas neniigi nin! Vane vi volas mortigi nin!"

Komprenu bone la vortojn de la floretoj!

Ekster la barilo, apud la kradpordo, troviĝas monteto, ĉe ĝia mezo maljuna pinarbo altiĝas. Sub ĝi multegaj lavendoj floras. Inter tiuj bonodoraj kaj belkoloraj lavendoj, dekoj da blankaj papilioj flugetas, poste descendas sur la florojn. Kvazaŭ estus la Kongreso por Blankaj Papilioj. Laŭ mia scio ĝi nomiĝas brasikpapilio.

Aparte ĝojigis min vidi ĉi tiujn papiliojn, ĉar ili memorigis min al bela pupteatraĵeto, verkita de fama kaj talenta poeto-verkisto Zsiga Palocsay. La ĉefrolantoj de la spektaklo estis tri papilioj. Nia reĝisorino, Ildikò Kovàcs, al mi donis la tri rolojn, laŭ peto de la verkisto. Neniam mi forgesos la noktan papilion. Ĝi estis arte kreita de pupkreinto Aneli Lukasz. Ĝi estis el belega blua veluro konstruita! Eble mia plej bela pupo dum mia 25 jara pupista vivo.

Tiuj belegaj memoraĵoj fantastan vivenergion donas al maljuniĝantaj homoj. Mi aŭdacas konsili al vi ĉiuj, taksu ilin alte!

BRULLIGNO

Oni alportis la brullignon por la vintro 2016/2017.

Jam de jaroj ni havas bonegan sistemon por kolekti la monon necesan. Komence de julio, ĉiumonate ni flanken metas 100 eŭrojn. Tiel ne estas problemo pagi la lignon por unu jaro. Nun ni pagis 970 eŭrojn por unu jara varmo. Kaj jam dufoje alvenis Giacomo, por stokigi la hakitajn lignojn, ja por ni jam estas tro laciga laboro. La horpago nuntempe ĉitie estas 10 eŭroj.

La monon en koverto ni metis en belegan bildlibron pri Nederlando. Pro tio ĝia nomo estas la "nederlanda mono". Ĝi estas "sankta" kaj "nealirebla", kvazaŭ ĝi ne ekzistus, sed en ĉiu printempo faciligas la elspezon pro la ligno.

REŬMATISMO

Neatendite aperis ĉi printempe la aĉa reŭmatismo. Ĝi suferigas kaj turmentas min. Mi abomenas plendi, do, pli bone mi finas mian leteron.

Mi deziras al vi ĉiuj, nur elteneblajn dolorojn – se jam nepre devas dolori io.

Kun amo,

Julia

- Ismail Kadare

La filino de Agamemnono

Fragmento

Ĉapitro tria

La ŝtuparo estis malplena, ankaŭ la strato, sur kiu mi ekvidis nur kelkajn pasantojn. Mi eksentis trankviliĝon, eble pro la spaco. Mi levis la kapon, kvazaŭ altiritan per ies rigardo. Efektive, sur unu el la balkonoj staris nia najbaro. Li rigardis en la straton same malgaje kiel ĉiam. Mi paŝis malantaŭen por ne esti videbla. Oni diradis, ke li ridis en la tago de la morto de Stalin, kaj tio rompis por ĉiam lian brilan karieron de sciencisto. Pasis jaroj, sed de kiam mi memoras, ĉi tiu esprimo de malgaja enpensiĝo restis sur lia vizaĝo. Ne nur li ne bridis sian gajecon dum funebraj popolmarŝoj ĉi-tage, ĝuste estis stultado, efekto de la fŭsa mekanismo de rido, io konata en tiaj situacioj, sed tute neakceptebla por senkulpigo. La similulojn oni persekutadis senkompate kaj nun, post tiom da jaroj, ili estis facile rekoneblaj laŭ malgajeco sur la vizaĝo, per kiu ili devos penti tiun rideton ĝis la vivofino.

Pli bone rigardu vian vizaĝon, mi diris al mi en la animo. Certe ĝi ne estas pli malgaja ol ĉe li.

Kvazaŭ timante, ke la malfervoro en mia konduto povus ĉe iu veki suspekton, mi elpoŝigis la invitilon kaj kun precipa atento mi rigardis la dorspaĝon, sur kiu estis signitaj la vojoj por iri al la tribunoj.

Grupo de homoj, kiuj ankoraŭ restis sur la strato, certe havis invitilojn. Vidigis tion ne nur iliaj vestoj, sed ankaŭ la konduto: kiel ili paŝis, kiel sereniĝis iliaj vizaĝoj. Ili ne similis aliajn pasantojn, tiujn, kiuj eliris sur la straton kun la espero trovi ian lokon, de kie ili povos rigardi la marŝon, aŭ kiel delegitoj de siaj uzinoj ili perdiĝis kaj nun vagadas nervozaj.

La strato de Barikadoj, paralela al la Granda Bulvarado, estis plene ŝtopita. Malproksime, eble sur la placo antaŭ la tribunoj, aŭdiĝis muziko de blovorkestro. Ĉiufoje, kiam mi orelkaptis tiujn sonojn, mi plirapidigis miajn paŝojn, kvankam pasis nur la naŭa horo kaj estis sufiĉe da tempo, ĝis komenciĝos la marŝo.

La invititoj ankoraŭ miksiĝis kun aliaj pasantoj, sed kelkajn paŝojn antaŭ mi estis okazanta la unua selekto. Supre de la strato Elbasana unu trotuaro estis por ĉiuj, kaj sur la alia, dekstre, rajtis iri nur tiuj kun la invitilo. La vera kontrolo komenciĝis pli malproksime, ĉi tie daŭris nur la unua selekto. Tamen multaj gastoj volis jam nun disiĝi de la ordinaraj pasantoj, kiuj rigardis ilin senemocie.

Senĉese mi iris la maldekstran trotuaron kaj pensis, ke eble Suzana havas ankaŭ lokon sur la sama tribuno C-I, kiam subite mi kunpuŝiĝis kun B, Ll.

De centjaroj mi ne vidis loin. Alta kaj ridanta de orelo al orelo, li ĉirkaŭbrakis min kore, sed havis alian rideton ol tiu, kiu kvazaŭ disradiadis el ruĝaj flagoj. Tia eksplodo de rido - sincere dirite - ŝajnis al mi suspektinda. Antaŭ jaroj ni vere amikiĝis, kiam mi studis juron, kaj li vizitadis la Akademion de Belartoj, sed ne tiel, ke mi ankoraŭ pensu pri li.

- Kiel vi fartas? - li demandis. - Kio nova en la ĵurnalista mondo? Lumoj, filmiloj, monda vivo, nur enviadi

- Kaj ĉe vi? - mi demandis. - Ĉu vi daŭre estas en N.?

- Aĥ, ne babilinde - li respondis per la sama voĉo kun ŝerca tono. - Iel mi elturniĝas. Unue estis en ordo, sed poste mi faris eraron kaj oni sendis min kun grupo de amatoraj aktoroj, por ke ni laboru en vilaĝo.

- Ĉu vere?

- Ho, jes! Mi prezentis sur la scenejo teatraĵon, en kiu estis trovitaj tridek du ideologiaj eraroj. Ĉu vi povas imagi? Nu, bone, tio jam okazis, feliĉe mi savis la vivon!

Ŝajne mia vizaĝo devis esprimi samtempe miregon kaj nekredemon, ĉar li aldonis:

- Certe vi pensas, ke mi ŝercas, sed tio estas vero.

Kaj per la sama voĉo sen ajna zorgo, plendo aŭ kolero, li ankoraŭfoje ekparolis pri siaj tridek du ideologiaj eraroj. Mi eĉ dirus, ke li rakontis kun pleuro, por ne diri kun kaŝita fierego oni ne scias pri kio: ĉu pri tiuj, kiuj scipovis trovi ĉiujn erarojn unu post la alia, aŭ pri li, kiu faris nek unu pekon malgrandan,

peketon, sed malbridis katastrofon, kaj eble tion kaj alion samtempe.

Tiel okazis - li finis. - Их было 26, 26 их было, их могилы пескам нне занестъ.

Neniam mi eksciis, kion ĉi tiuj versoj el la poemo de Jesenin havas komunan kun tio.

Dume ni proksimiĝis al la stratkruciĝo, kie la invititoj forlasis ordinarajn pasantojn. En aliaj cirkonstancoj mi neniam montrus la invitilon al la kolego, kiu estis kondamnita, sed nun mi devis tion fari. Samtempe, kiam aŭdiĝis lia demando: „Kaj kio nova ĉe vi?“, ne senĝene, ridetante kvazaŭ pro kulposento, mi elpoŝigis la kartoneton kaj diris:

- Kiel vi vidas, mi estas invitita, do...

Mi hezitis, kiel fini la frazon, ŝerce, serioze aŭ kun ironio - mi ne scias kontraŭ kiu: kontraŭ mi, kontraŭ li ĉu kontraŭ la sorto, kiam li ekkriis ĝoje, kio tuj malstreĉis la situacion.

- Aĥ, vi havas la invitilon! Feliĉulo vi estas! Mi gratulas! Sed ĉu vi ne rapidu? Vi malfruiĝos!

Sur lia vizaĝo kaj en la voĉo estis nenia ironio aŭ kaŝita envio kaj mi eksentis riproĉojn de la konscienco, ke irante la lastajn dudek metrojn mi pensis, ke mi devos iel liberigi min de li.

Post la stratkruciĝo, antaŭ ol mi venis al la unua vico da policistoj sen uniformoj mi turniĝis lastfoje kaj ekvidis, ke li akompanas min per sia gaja rigardo kaj svingas la manon adiaŭe.

Iom mirigis min lia bonvolemo. Sed la suspekton, ke tia konduto simple montras falon de la homo, kiu pro nekonataj kaŭzoj trovas plezuron en sia malfeliĉo (en aliaj cirkonstancoj mi komencus maltranviliĝi), disblovis liaj amikaj gestoj, kiuj tre faciligis al mi la unuan renkontiĝon kun la vico da policistoj.

- Viajn dokumentojn!

Okulangule mi vidis, kiel rigardo de civilulo migras inter la foto sur la identiga karto kaj mia vizaĝo, kaj mi klopodis rimarki en ĝi - mi ne scias kial - signon de nekredemo, malbona volo aŭ tute male: de estimo. Kelkajn minutojn poste, kiam mi antaŭenigis min, mi ekpensis, ke mi vere kondukas strange, se mi timas, kiel miaj vizaĝo, familia nomo aŭ invito impresis policiston en civila vesto, kiun plej verŝajne mi renkontos neniam.

La Bulvarado Marcel Caçin, kuniganta la Straton Elbasana kun la Granda Bulvarado, estis barita por la pasantoj. Laŭlonge, grupete aŭ malkune kiel mi, iris nur la invititoj. Iuj kunprenis siajn infanojn, kiuj tenis flagetojn aŭ plastajn florojn. Aliaj kroçis al la brusto medalojn, kiuj per ora brilo speguliçis en iliaj vizaçoj. Antaŭ mi vigle paŝis diktrunka viro kaj kondukis du knabinetojn. Ambaŭ havis kokardojn sur haroj, unu - la ruçan, kaj la alia - la bluan. Iliaj vizaçoj konvenis al çiu kadro de la dokumenta filmo pri ŝtataj festoj.

La dua vico da policistoj staris proksime al la unua. Mi atendis pli severan kontrolon, sed denove okazis same. Tio elrevigis çi tiujn, kiuj venis unuafoje kaj atendis precizegan traserçon. Kaj çia severeco pligrandigus la valoron de la invitiloj. La viro, kiu marŝis kun du knabinetoj antaŭ mi, ne kaŝis malkontenton, kiam du policistoj ordonis senzorge: „Transiri!”, dum li informis, ke la knabinetoj estas liaj filinoj, kaj li povas montri iliajn naskiç-atestojn.

La viro skuis la kapon, kvazaŭ li volus diri: aĥ, do tia estas via gardemo!? Mi volis entrudiçi en la interparolon kaj diri: ne koleru, sinjoro, dumvoje al la tribunoj ankoraŭ estos aliaj kontroloj, multe pli severaj!

Çi tie la Bulvarado Marcel Caçin estis ne nur larçga, sed kurbiçis vaste, kio permesis vidi kvazaŭ sur polmo çiuajn invititojn. Unu iris post la alia, kun apenaŭ bridata senpacienço, en la printempa suno, kiu kun medaloj, flagoj, kun pli kaj pli laŭta marŝmuziko vekis çojan solidarecon çe fremdaj homoj.. Kaj estis kompreneble. Sufiçis, ke la sama mano (mano de la ŝtato) elektis nin por festi kune tiun çojan tagon, kaj tio decidis aliçon al la ora alianco, la deziron paroli kaj rideti unu al la alia. La ordinaraj pasantoj sen invito ja restis antaŭ la vico da policistoj, por ne maltrankviligi nin per siaj lacaj, obstinaj, traboraj rigardoj, demandante: Kial oni elektis çuste vin?

Mi ekhontis, ke mi partoprenas çi idilion kaj subite mi sentis nevenkeblan deziron ankoraŭfoje kroçi rigardon al B. Ll., kiun mi traktis kun ia orgojlo, kaj li kondutis digne. Li ne nur faris al mi tiun malbenitan demandon, sed ekçojis sincere pro la vidita invitilo, malgraŭ ke delonge oni senigis lin je la rajto partopreni çiuajn oficialajn solenaçojn.

En la tria kontrolejo mi ekvidis konatan aktivulon el mia kvartalo. Nur nun mi komprenis, ke kun civil-vestitaj policistoj

miksiĝis diversaj funkciuloj el la Ministerio pri Internaj Aferoj kaj kvartalaj aktivuloj, kiuj certe estis sekretaj kunlaborantoj. En aliaj cirkonstancoj mi rigardus lin kun malŝatego, sed ĉi tie, en la etoso de la festa unueco, mi volis rideti al li. Sed li ne reciprokis mian rideton kaj ŝajnis, ke li ne konas min. Indiferente li turnis paĝojn de mia identiga libreto, kvazaŭ neniam en la vivo li estus vidinta min, kvankam ni renkontiĝis ĉiutage en la vico antaŭ la nutraĵ-vendejo, kaj ne rigardante en miajn okulojn, li ordonis: „Transiri!”

Mi sentis, ke ruĝiĝas miaj vangoj, sed post kelkaj minutoj lia fanfarona indiferento malbridis en mi ĝojon. Do, kvankam ĉiutage mi estis en amaso da elektitoj (mi hontis pro tio, sed malklare, apenaŭ senteble mi trovis min distingita), oni ne plu identigis min kun ilia komunumo aŭ kun ĝia sombra esenco, se diri precize. Jen, pro kio la najbaro-saktivulo rigardis min tiel malamike. Ŝajne li murmuris subnaze: Kaj kion li serĉas ĉi tie? Kiu elektas tiajn ulojn, ke ili staru sur la tribunuo?

De tiu momento mi rimarkis malamikecon kontraŭ mi. Ju pli mi proksimiĝis al la bulvardo, des pli videbla ĝi estis. Sed ankoraŭ ne tio pleje afliktis min. Ĉar ĝuste kiam mi ne atendis tion, kiam mi pensis, ke mi devos min defendi nur antaŭ enviado (estis ja kompreneble, ke tiuj, kiuj al kutimiĝis al tio, ke de ĉiam ili estis invitataj, rigardas malamike tiujn, kiujn oni invitis unuafoje), do, kiam mi pensis, ke mi devos min defendi nur antaŭ enviado, kaj la suspekta demando (Kaj tiu ĉi, per kio li meritis la inviton?) ne aŭdiĝos ĉi tie, ĉar ni ĉiuj estas en simila situacio, oni povas diri - ni veturas sur la sama ĉaro - ĝuste tiam la malamikeco prezentis sin tiel videble kiel neniam. Du junaj viroj en manteloj, kun tiaj vizaĝoj, ke al vi ŝajnas koni ilin de ie, sed vi ne estas certa, de kie, rigardis min, preterpaŝante. Mi havis la impreson, ke en iliaj okuloj brilis moko. Mi turniĝis por certigi min, ke okazis alie, tio signifas, ke ili ne rigardis min, ke mi falas en paranojon, sed kun teruro mi konvinkiĝis, ke min ili serĉis. Ili ne nur rigardis senĉese, sed interflustris kun malica rideto.

Mi eksentis, ke mi ruĝiĝas. La penson, ke mi plirapidigu miajn paŝojn, anstataŭis la kontraŭ-penso, ke mi haltu kaj diru al ili: kion vi interflustras, kial vi grimacas kiel aĉaj maljunulinoj? Mi havas la saman rajton suspekti vin, ĉu ne?

Mi faris nek tion, nek alion, kaj nur paŝis antaŭen,

klopodante ne pensi pri ili. Mi iom trankviliĝis, kiam disigis nin grupo de ĝojaj homoj, inter kiuj mi ekvidis la diktrunkan patron kaj liajn filinetojn - unu kun ruĝa kokardo, kaj la alian - kun la blua.

En la animo mi plu disputis kun tiuj du nekonatoj. Kial nur vi havas la rajton pri suspektado, kaj ne mi? Pro kio vi pli bonas ol mi?

Tiel mi interparolis kun mi, sed mi ne scias kial mi havis la impreson, ke nenio povas forigi de iliaj vizaĝoj moka rideton. Kaj subite mi imagis, ke mi trovis respondon al miaj demandoj: superecon havas tiu, kiu komencis suspekti kiel la unua. La suspektito, eĉ se li estas senkulpa, troviĝas en pli malbona situacio jam pro tio, ke li malfruiĝis.

Ho, kiaj stultaĵoj, mi diris al mi. Vane mi klopodis rememori, kion mi estis leganta pri kolektiva kulpo, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Sed nenion mi memoris.

Antaŭ mi du knabinetoj kun la kokardoj demandis ion pepe. Kun pacienco la patro respondis al ili, nomante ĉiun karese.

La ideala patro, kondukanta siajn filinojn sub la suno de la socialista Unua majo-tago. Idilia vidaĵo, mi ekpensis, sed nur imagu, kian prezon vi pagis por ĉi tiu idilio? Kiun vi kondamnis al ekzilo?

Mi ekmiris pro mia kolero. Sed tio ne malhelpis, ke mi ĉirkaŭrigardu kun malamo. Mi estis kiel teroristo, blindigita de sango, kiu pafas trafe-maltrafe en homamason. Antaŭ ol ili min atakos, mi estos pli rapida. Malvenkas tiu, kiu malfruiĝis.

Poeziaĵo de

Rita Petro- Filipi



Ĝisoste

La tagoj danĝeras
kiam ni kunestas

La viandon ni elmanĝas ĝisoste
Absorbas ni ĝin ĝismedole,

La vinon ni elektas ruĝan
Eldrinkas ĝin ĝisfunde
Apenaŭ ĝi atingos nian cerbon,

La cigaredon ni elsuĉas profunde
Ĝis kiam niaj pulmoj pleniĝas je fumo,

La kafon ni trinkas koncentritan
Ĝis kiam ĝi aliru nian koron,

La matracon ni elektas
je forta elasto
Por ke la likvaĵoj enverŝiĝu
pli internen...profunden.

La tagoj kiam ni kunestas
Tre danĝeraj ja estas
Ĝisoste bongustaj.

Albane

DERI NË KOCKË

Ditët që jemi bashkë
Janë të rrezikshme.
Mishin e hamë deri në kockë
E thithim atë sa të arrijë në palcë,
Verën e zgjedhim të kuqe
E pimë me fund
Deri sa të arrijë në tru,
Cigaren e thithim thellë
Deri sa mushkëritë na mbushen plot tym,
Kafen e pimë të shkurtër
Aq sa të shkojë drejt e në zemër,
Dyshekun e zgjedhim me
Elasticitet të fortë
Që lëngjet të derdhen
Në brendësi... thellë.
Ditët që jemi bashkë
Janë fort të rrezikshme
Deri në kockë të shijshme

Sabit Uka
(1920-2006)

Historio de albana bebo forlasita dum la eksodo en la jaroj 1877-1878

Post la rusa- turka milito, (1877-1878), la Osmana Imperio estis devigita rezigni de sufiĉe granda teritorio sude de Serbio, loĝata precipe de albanaj etnuloj. Dum la severa vintro 1877-1878, centmiloj da albanoj forlasis siajn terojn kaj domojn, forpelitaj de la serbaj soldatoj kaj volontuloj. Okazis ke, pro hasto kaj teroro ekzercita, oni forlasis en la luliloj eĉ bebojn dormintajn. Ĉi lastaj, plejparte, poste mortis pro malvarmego kaj malsato, aŭ masakriĝis de serbaj soldatoj.

Okazis ankaŭ tiel: serba familio kiu ne povis naski bebon, adoptis la forlasitan albanan infaneton. Jen kion rakontas mem la persono adoptita, multajn jarojn poste:

Mi naskiĝis en pitoreska vilaĝo de la regiono de Kurŝumlio. Min kreskigis kaj edukis Dragan kaj Jelena. Ili amis min, same mi ilin. Nenion ili ŝparis por mi. La elementan lernejon mi sekvis en la naskiĝloko, dum la mezlernejon en la urbo de Niŝ. Mia unua najbaro estis Ratomir. Mi pasigis la plejgrandan tempon kun li. Mi ne povas forgesi la printempajn tagojn, kiam ni paŝtis la ŝafinojn en la romantikaj paŝtejoj de la vilaĝo. Kun la gepatroj, ĉiun dimanĉon ni frekventis la preĝejon por meso en la najbara vilaĝo. La malsimpatia pastro lernigis min kelkajn preĝojn. Dum la paska festo, la pastro estis respektinda gasto de mia familio. Mia patro adoris lin kiel predikanton de la kristana religio. Ofte alportis lin mielon, kokinojn ka, en la ties mirakla domo, apud la preĝejo. Preskaŭ ĉiufoje la patro venigis ankaŭ min al li.

La pastro havis du filinojn kaj unu filon. La dua knabino de la pastro esprimis apartan simpatian por mi. Dum mi, iom ĉasta, ŝvitiĝis kiam ŝi, je la okuloj de la gepatroj, flirtis kun mi. La pastro ekridis kaj alparolis mian patron:

- Dragan, via filo estas tre saĝa. Se vi aŭdas min, post la mezlernejo, kion li finstudis escelente, aligu lin en la militista akademio. Plej probable li fariĝus splendida oficiro de la armeo de Lia Escelenco Kralo. Ĉi tiu knabo estas mirinda, kristanema kaj patriota, tiel, se Dio volas, li povus fariĝi mia bofilo!

Tiel parolis la pastro, dum mi ĉion akceptis rezerveme.

Tra la lernejoj kaj preĝejoj oni faris rabieman kampanjon

antialbanan. Oni inventis neimageblajn ekzemplojn por prezenti la figuron de la albano kiel primitivan homon. Okazis ankaŭ ke oni konsideris albanojn bestioj kun vosto. La serbaj patrinoj timigis la siajn ne obeemajn infanojn alparolante per karakteriza ĵargono:

"Silentu fileto, aliel mi alvokos la albanon kaj li tuj englutos vin per lia granda faŭko simila al krokodilo!"

Ankaŭ mi, ekde infanaĝo, kreis en min la negativan imagon pri albano kaj ĝismedole timis je li, pensante ke li kondukas min kiel ombro.

Finstudinte la militistan akademion, oni gradigis min oficiro de la infanterio. Kelkajn jarojn mi deĵoris en la gardistaroj de la Serbiaj urboj. La gepatroj estis jam maljuniĝintaj kaj ne povis min viziti. Kvankam prezentiĝis al mi kelkaj edziĝofertoj, mi ne akceptis ilin. Post kvin jaroj da deĵorado, laŭ la ordono de la Supera Stabo, mi gradiĝis majoro kaj komencis deĵori en unu el la urboj de Kosovo. Tie, mi profitokazis renkontiĝi kun pluraj albanoj. Ho, kiom multe plaĉis al mi ĉi tiuj mirindaj homoj!

Apud mia loĝejo, estis albana najbaro. Li nomiĝis Hasan. Lia profesio estis advokateco. Li estis studinta pri juro en Zagrebo. Nun por mi estis klara kial Serbio malamas albanojn, ĉar ili estas pli fascinaj, pli ĉarmaj, pli inteligentaj kaj pli bravaj ol la serboj. Estis aŭtunofino. La patro anoncis min ke la patrino estis grave malsana pro nekonata kaŭzo. Mi tuj iris viziti ŝin, kiu kisis min sur ambaŭ vangoj, pro nostalgio. Ŝi aspektis pala kaj maltrankvila. Mi klopodis kuraĝigi ŝin, sed la larmoj daŭre glitis sur la ties vizaĝon. Rigardis ŝi min scivoleme kaj mirigite.

Neniam mi spertis tion antaŭe. Mi havis la impreson ke ŝi ion tre gravan volis diri al mi aŭ postlasi min testamenton. La duan tagon, post kiam la patro aliris Niŝon por ricevi kelkajn medikamentojn, ŝi kvazaŭ eksentis ian eŭforion. Ĉar en la ĉambro restis nur ni du, ekis longa dialogo. La ĉeftemo estis mia estonto. Ŝi konsilis min bone konduki en Kosovo rilate albanojn. Dum momenteto, koncentrate sian rigardon al mi, ŝi alparolis la jenajn vortojn:

- Mia kara filo, hodiaŭ mi volas malkovri sekreton, kion nur mi kaj via patro ja scias, koncerne vin. Mi ne volas ŝarĝi min per granda pekaĵo al Dio. Mi kaj via patro estas alvenintoj ĉi tie. Ĉi tiu vilaĝo apartenis al albanoj. Tiutempe ĉi tie okazis militistaj severaj operacoj inter serboj kaj albanoj. Kiam niaj fortoj atakis

ĉi tiun vilaĝon, via familio forfuĝis, eble je direkton de Kosovo. Vi devas scii ke estas vi naskita de albana patrino. Enirinte en vian domon por forrabi kelkion, en ĉambro bele meblita, nin surprizigis lulilo kaj en ĝi sesmonata bebo. Tiu bebo estis vi, mia filo. Pro danĝero, certe, viaj gepatroj ne havis eblecon kunporti ankaŭ vin. Povra patrino, neniam kaj eterne apenaŭ forgesos vin. Ŝi, certe, estas pensinta ke ni mortigis kaj masakris vin.

Sed la sorto via estis alia, ĉar ni estis bonaj homoj, mi kaj via patro, Dragan. En la sino de serboj ekzistis ja ankaŭ tiaj, kiuj ĵus malkovrinte vin, senkapigus vin kiel ŝafidon, kaj...Vi, mia filo, nun povas serĉi vian patrinon kaj ĝui ŝin. Mia filo, ne forgesu nin! Notindan parton de la nia vivo, ni estas dediĉinta vin. La kialo ke mi adoptis vin estis ĉar mi ne povis naski.

Dum la tuta dialogo kun Jelena, mi klopodis elteni min, kvankam mi eksentis neeksplikeblan maltrankvilon. En la mia kapo turniĝis iuj ajn pensoj. Ju pli mi dezirus trovi mian veran patrinon, des pli mi malamus tiun, kiu nenion sakrificis por savi min pro sovaĝaj serbaj hordoj.

Trovite senatendite en la vivaj vojkruĉiĝoj, la fortaj sentoj kiuj ligis min ĝis tiu tago kun la gepatroj, kvazaŭ malaperis tute. Spirite kaj morale mi vidis min en nedifinita areo de la mia perspektivo. Ne pli sentis min serbo, sed fakte nur la serban mi scipovis. Ankoraŭ mi konsideriĝis serbo, dum en miaj vejnoj por mi nun estis klara ke trafluis pura sango de albano. Ĝis hodiaŭ, mi predikis la kristanisman, dum nun mi ne plu volas vidi la krucon. Ankoraŭ mi ne estas cirkumcidita kaj nenion scias pri Muhameto. La mulaon en la moskeo ĝis hodiaŭ mi malamis, dum ekde hodiaŭ mi devas fariĝi bona muslimo.

Reveninte Kosovon, mi malrapide rekonsciiĝis. La naturon de Kosovo nun mi ekvidis per romantikaj koloroj. La albanoj ŝajnis al mi pli mildaj, pli karaj, kaj pli civilizitaj ol la serboj. Mi ekinteresiĝis ankaŭ pri la albana lingvo. Mia najbaro Hasan, ekvidinte mian intereson pri la albana, kompilis vortareton serbo-albanan per latinaj literoj. Post ses monatoj, mi lernis tiom da albanaj vortoj kaj ekzerciĝis, kiom mi eksurprizigis multajn albanojn per mia flua parolado, dum la libera tempo. Kvankam mi klopodis ne elmontri la grandajn psikajn ŝanĝiĝojn kiuj okazis en mia personeco, kelkaj el miaj kunlaborantoj provis eniri en mian internan mondon por kompreni kio estas okazanta kun mi. Eĉ, unutage la komandanto de la reĝimento, kiu aprecis

kaj amis min multe, alvokis min al lia oficejo kaj rekte demandis kio estis okazanta ĉe mi, kiu ne plu estis intime gaja kaj dinamika kiel iam. Dum mi respondis lakonece:

- Mia patrino estas ja grave malsana. Ĝi agonias.

Li, verŝajne, kredis komplete al mia paroloj kaj klopodis konsoli min.

Multajn tagojn mi pensis kiel agi por ke mi trovu miajn verajn gepatrojn. Mi kompilis multajn agplanojn por realigi sukcese mian celon. Sed mi devus agi je plena konspiracio, alie, se oni malkaŝus miajn planojn, tio kostus min je propra vivo.

Ĉar ĉirkaŭ mi jam estis kreita larĝa reto de albanaj amikoj, tra ili mi enketis pri konsiderinda nombro da rifuĝintoj el la vilaĝo Prebrezë. Do, el la vilaĝo kie mi naskiĝis kaj kreskiĝis. Pli poste mi vizitis mem tiujn homojn.

Malrekte, tra demandoj kaj subdemandoj, ili priskribis por mi iliajn serpentumajn vivovojojn ekde la translokiĝo disde vilaĝo Prebrezë. Estas interese ke ĉiu el ili, priskribante detale la serbajn masakrojn, ofte haltis ĉe la ekzemplo de Hasim Hajzeri, kies sesmonata bebo estis forbruligita enhejme. Al mia demando ĉu kelkiu konas Hasim Hajzeri-n, ili senhezite respondis:

- Kial ne, ni konas Hasim Hajzeri-n. Li jam estas multe maljuniĝinta, sed je ankoraŭ bona sanstato. Lia edzino, la veron dirante, estas pli forta ol li. Li havas ankaŭ kvin aliajn filojn kaj kvar filinojn. Li vivas en Shkup (Skopje), kaj bonfartas. Ofte li vizitas nin, same ni. Ĉar ni estas parencoj.

Estis la komenco de la printempo. La gardistara komando, donis min dek tagojn da ferioj, rekompence pro mia laboro. Post kiam mi havigis al mi la precizan adreson de la miaj veraj gepatroj, danke al Ajet Prebreza, per trajno, vestite kiel majoro, mi ekveturis Shkup-on. Mi estis ege emociigita. Mi estis antaŭvidinta kelkajn versiojn rilate mian prezentiĝon antaŭ mia familio, kiu probable ne povus akcepti min kiel la sian, post kiam oni estas deklarinta min masakritan kaj forbruligitan, fare de serbaj hordoj.

Mia frapo sur la pordon de la korto de Hasan Hajzeri, ŝajne kaŭzis miron kaj timon. Ili neniel povis kompreni la celon de la neatendita vizito de altranga oficiro de la armeo de Kralo en ilia hejmo. Eĉ la najbaroj, vidinte min enirante en tiun domon de la miaj songoj, komencis maltrankviliĝi kaj ne povis kaŝi ilian scivolemon por ekscii kiu ja mi estis kaj kial mi estis alveninta

tie. Komence, la patro Hasim restis iom konfuzita, sed baldaŭ mi akiris lian koron kaj animon. Certe al tio helpis, je enigmateca maniero, la forto de la geno de mia sango, kiu elfontis el la vejnoj de tiu simpatia viro.

- Pardonu min, sinjoro majoro, ĉu mi povas scii kiu vi estas kaj kio bona venigis vin al mia hejmo?- tiel sin turnis la konfuzita patro, kiu ankoraŭ ne sciis ke mi estis lia filo.

- La serboj nomis min Miloŝ, dum mia patrino, naskinta min, estas baptinta min per la nomo Sami. Mi alvenis ĉi tie por ke konatiĝu kun vi. Plejprobable, ni havas intimajn sangorilatojn.

- Ĉu vi scias kiel nomiĝis viaj gepatroj kaj de kie ili estas?

- Oni estas dirintaj ke mia patrino nomiĝis Ŝahzade, dum la patro Hasim. Mi naskiĝis kaj kreskiĝis en la vilaĝo Prebrezë de Toplica.

- Ho, viro, mi petas vin pli bone klarigi kelkajn aferojn, ĉar, je Dio, nenion mi komprenas ĝis nun.

- Nia renkontiĝo hodiaŭa finiĝas ĉi tie. Mi alvenos denove post du tagoj por viziti vin. Dankon al vi pro via varma akcepto, sed mi bedaŭras ke mi ne vidis ankoraŭ la patrinon Ŝahzade.

- Ĉu vi diris "Mi bedaŭras ke mi ne vidis la patrinon Ŝahzade"? Kiu sciigis vin ke mia edzino nomiĝas Ŝahzade?!

Jes ja, tiel mi esprimis min. La nomon de mia patrino aldiris min la aliaj personoj. Estas ili viaj parencoj, translokiĝintaj de Prebreza al la diversaj regionoj de Kosovo.

- Ĉu vi estas fantomo sin prezentinta je aspekto de majoro? Ĉar la majoro de la armeo de Kralo ne havas motivon por viziti nin pro bono. Pri tio mi estas certa.

- Ne zorgu, vi, bona homo, je Dio, mi ne estas fantomo, sed homo, eĉ tre proksima al vi. Post du tagoj, kiel mi jam diris, ni havos la okazon interparoli pli longe, sed tiukaze mi bezonas ankaŭ la ĉeeston de la patrino Ŝahzade.

- Nu bone, junulo, sed post du tagoj mi timas ke mi freneziĝos.

- Ne, ne, mi ne kredas je tio. Vi estas elmontrinta ke vi estas forta viro. Kial vi ne freneziĝis post kiam vi forlasis vian filon sesmonatan en la manoj de la malamikoj?!

- Hamit, iru kaj voku vian patrinon por veni tuj ĉi tie!- sin turnis Hasim al sia plej junaĝa filo.

La tempo pasis tre rapide..Unutage, mi revenis al mia laborloko. Mi elprenis el la oficejo ĉiujn dokumentojn kaj diversajn

notaĵojn. Mi renkontiĝis kun kelkaj kamaradoj kaj petis ilin akompani min, venontan semajnon, por feriado en la Malbenita Montaro. De tie, mi ŝatis ekrigardi Albanion. Nun ĉi tiun ŝtaton mi konsideris atraktiva kaj mi fieris pro ĝi. Se miaj kunlaborantoj eksciis kion mi estis plananta, certe ili mortigus min pro malamo. Mi komencis malami ĉion serban. Je kazo de neceso, mi pretus gvidi reĝimenton de albanoj en la milito kontraŭ la serbajn barbarojn. Ĉio tio rondiradis en mia kapo. Finfine, alvenis la multe atendata tago por rekonatiĝi kun miaj gepatroj. Ĉi tiujn du tagojn, ili, certe, travivis scivoleme kaj surprizeme. Certe, du tagoj estas ŝajniĝintaj al ili kiel du semajnoj en la normalaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj. Alveninte en la hejmo de la gepatroj, okulfrapis min eksterordinara akcepto. Mi trovis ĉiujn en la gastoĉambro: la patron, la patrino, la gefratojn, la genepojn kaj gebofratojn. Ĉiuj ili estis vestite kvazaŭ dum la plej bona festotago. Mi supozis ke ili estis konkludintaj ke estis ĝuste mi kiu, antaŭ multaj jaroj, estis perdiĝinta, konvinke kredante ke la malamiko estis masakrinta min je plej kruela maniero.

Ĉiuj akceptis min per stranga konduto. Aparte ĉirkaŭbrakis min la patrino Ŝahzade. Ŝi kisis min sur miajn du vangojn, sur la okulojn kaj sur la frunton. Unuafoje en la mia vivo, mi eksentis forte la varmecon kaj la agrablan aromon de la mia patrino naskinta min. Ĉiuj elverŝis larmojn pro nostalgio kaj ĝojo. La patro staris fiera. Certe plaĉis al li la gradoj de majoro. Ĉiam li sonĝis havi unu filon oficiro, kiu gvidus taĉmenton de albanoj de Toplica kaj venĝus por ĉiuj tiuj krimoj faritaj de serboj kontraŭ senkulpajn homojn.

Ĉiuj demandis min laŭ sia deziro kaj scivolemo. Nur la patrino ankoraŭ restis hezitema. Certe ŝi ankoraŭ dubis pri mia identeco, eble mi estis ia trompulo emanta krei aferojn kaj skandalojn. Dum momenteto, ŝi ekstariĝis kaj sin turnis al mi per la melankoliaj vortoj:

- Pardonu min, filo mia, ĉu vi akceptas ĉi tie, antaŭ ĉiuj homoj, ke vin senvestigu de la zono supren?

- Jes, ja. Kun plezuro- diris mi kaj komencis min senvetigi.

Ĉiu atendis senpacience pri la scenaro pretigita jam de la patrino por tiu grava rekoniga ago. Post kiam mi senvestiĝis, ŝi diris min:

- Nun ekstariĝu kaj per la manoj, alten levitaj, vin turnu trifoje

surloke, por ke mi vidu ĉi tiun belegan korpon de albano.

- Sami, nun haltu tiel surpiede.- Ŝi alproksimiĝis min kaj direktis sian fingron en certan lokon en la supra parto de la dekstra brako mia.

Ĉiuj estis atendente tion, kion estis elmontranta la patrino.

Plejmulte, al la patro interesis la ago de la patrino.

- Ĉu vi rimarkas ĉi tiun nigran signon sur la haŭto? Kun tiu signo ĉi junulo estas naskiĝinta. Vi certe ne scias kial li estas naskiĝinta kun ĉi tiu dekoriga signo surbrake. Tiutempe, ĉe la albanoj de Toplica ekzistis la konvinko ke, se ĉe la graveda virino aperas la demando frandi iun karakterizan manĝaĵon kaj la deziro ne plenumiĝas, tiam ĉe la bebo ekaperos signo je koloro de tiu manĝaĵo. Ankaŭ ĉe mi, en la oka monato de la gravediĝo, aperis la deziro por marmelado de certaj sekaj plumoj (poĵege), sed, tiamtempe, Hasim apenaŭ povis trovi tion en la tuta regiono, tiel la filo naskiĝis kun tiu nigra signo. Mi ne plu dubas ke ĉi tiu junulo estas mia filo. Dankon, benita Dio, ke vi malsekigis ĉi tiun karbigitan koron!

Ankoraŭ la patrino ne finis ŝian preĝon al Dio, ŝi svenis pro la ĝojo. La unua alproksimiĝis mi. Mi klopodis doni ŝin la unuan helpon. Ĉiuj estis ĉagrenitaj. La ĝojo kaj la malĝojo intermiksiĝis. Kiam ŝi rekonsciiĝis, en tiu feliĉega domo la rideto kaj gajeco estis atinginta la kulminan punkton de la muzikfestoj.

Post du tagoj, kune kun du pli junaj fratoj, mi transpasis malleĝe la landlimon kaj petis azilon en Albanio. Dum unu jaro mi laboris en infanteria taĉmento en la militista gardistaro de Tirana. La salajro estis pli bona ol en la jugoslava armeo. Ambaŭ fratoj sin ekokupis per aferismo. Post kvar jaroj ni konstruis duetaĝan domon kun tri apartmentoj. Ĉiuj ni tri edziĝis. Post tri jaroj, la cetero de la familio, unue translokiĝis en Turkio, kaj de tie al Albanio.

Enesperantigis Bardhyl Selimi, la 2an de aŭgusto 2016

